13-20 julio/juillet	<ul style="list-style-type: none"> • Esperanto-kursoj/Cours d'Espéranto 1-a grada/1^{er} degré 2-a grada/2^{ème} degré Supera/Supérieur 	Gerrit Berveling Vincent Charlot André Cherpillod (tradukado por franclingvanoj / traduction pour français) Franjo Provost Gerrit Berveling
19 julio/juillet	<ul style="list-style-type: none"> • Rakontoj pri esperanta vivo 	Pierre Métivier (prelego/conférence)
20 julio/juillet	<ul style="list-style-type: none"> • Memorfesto pri la 50 jaroj de Greziljono + jubilea memorigilo 	Fête célébrant les 50 ans de Grésillon + livre de mémoires
20-27 julio/juillet	<ul style="list-style-type: none"> • Esperanto-kursoj/Cours d'Espéranto 1-a grada/1^{er} degré 2-a grada/2^{ème} degré 3-a grada/3^{ème} degré • Prelegoj pri literaturo kaj teologio 	Carlo Bourlot Taĵana Loskutova Vincent Charlot Gerrit Berveling
27 julio/juillet ⇨ 3 aŭgusto/aôût	<ul style="list-style-type: none"> • Esperanto-kursoj/Cours d'Espéranto 1-a grada/1^{er} degré 2-a grada/2^{ème} degré • Seminario pri interkulturo "Ankaŭ ni estas <aliaj>" 	Carlo Bourlot Taĵana Loskutova Przemek Grzybowski
03-10 aŭgusto/aôût	<ul style="list-style-type: none"> • Esperanto-kursoj/Cours d'Espéranto 1-a grada/1^{er} degré 2-a grada/2^{ème} degré 3-a grada/3^{ème} degré 	Carlo Bourlot Taĵana Loskutova Jean-Luc Tortel
10-17 aŭgusto/aôût	<ul style="list-style-type: none"> • Esperanto-kursoj/Cours d'Espéranto 1-a grada/1^{er} degré 2-a grada/2^{ème} degré 3-a grada/3^{ème} degré • staĝo pri astronomio • Ludoj en Esperanto: Atelier création jeux 	Juanita Turbillon Taĵana Loskutova A. Junusof Jean-Charles Trébouet Christine Keyzers

Kosto de ĉiu unusemajna staĝo <i>(1/2 prezo ĝis 16 jaroj)</i> Kotizo port kulturaj elspozoj <i>(validas 1 jaron)</i> Loĝado Ĉambro por unu persono <i>(Ĉambroj estis renovita)</i> Ĉambro por du personoj Ĉambro por tri personoj Ĉambro por kvar personoj komuna dormejo Kampadejo (sen elektro) por unu persono por ĉiu alia persono de la familio Manĝo <i>(1/2 prezo ĝis 16 jaroj - senpaga ĝis 8 jaroj)</i> Matenmanĝo tagmanĝo vespermanĝo malvarma manĝo - pikniko	27,50 € 7,50 € 15,50 € 23,00 € 32,00 € 40,00 € 7,50 € 4,50 € 3,00 € 2,50 € 8,00 € 7,50 € 4,50 €	Prix de chaque stage hebdo- madaire <i>(1/2 tarif jusqu'à 16 ans)</i> Cotisation pour frais culturels <i>(valable pour 1 an)</i> Hébergement (prix par jour) <i>(les chambres ont été rénovées)</i> chambre individuelle chambre pour 2 personnes chambre pour 3 personnes chambre pour 4 personnes dortoir Camping (sans électricité) pour une personne pour chaque autre personne de la famille Repas <i>(1/2 tarif jusqu'à 16 ans - gratuit jusqu'à 8 ans)</i> petit déjeuner déjeuner dîner repas froid - pique-nique
--	---	---

KULTURDOMO DE ESPERANTO MAISON CULTURELLE DE L'ESPERANTO

**Kastelo Grezijono / Château de Grésillon
 F-49150 BAUGÉ**



☎ : 02.41.89.10.34 - Fakso/Fax : 02.41.82.55.22

retmesaĝo/courriel : grezijono.kastelo@free.fr
 tt/site : http://grezijono.kastelo.free.fr

banko/banque : MCE CCP, Nantes 1485 39 P

"Vera oazo en la dezerto de la lingva konfuzo"

ALIĜILO / BULLETIN D'INSCRIPTION

bonvolu aliĝi: kiel eble plej frue - dankoni / veuillez vous inscrire dès que possible, merci !

Nomo: Nom
 Adreso: Adresse

 Telefono: Téléphone
 Datoj de la staĝo: Dates du stage
 Mi interesiĝas pri la kurso de: Je suis intéressé(e) par le cours de
 Kiom da Personoj: Nombre de personnes
 Mi pagas la aliĝkostojn per ĉi-kuna ĉeko en la sumo de €
 UEA-konto **gres-y** kun indiko aliĝo Grezijono €
 Je joins un chèque postal/bancaire au nom de la Maison Culturelle Espérantiste €

Oni sendu aliĝilojn kaj ĉekojn al: *veullez envoyer vos inscriptions et chèques à :*
Maison Culturelle de l'Espéranto F-49150 BAUGÉ

Bonvolu sendi internacian respondkuponon se vi bezonas konfirmon pri via aliĝo; dankon. N'oubliez pas de joindre un timbre si vous désirez recevoir la confirmation d'inscription ; merci.

Dato/date :

Subskribo/signature :

La senprofitcela asocio "Kulturdomo de Esperanto"

fondita en 1951, posedas
 kastelon Grezijono kun
 18-hektara parko.

Ĝi organizas aŭ gastigas:

- ♦ **kursojn** diversgradajn
- ♦ **prelegojn** diverstemajn
- ♦ **distraĵojn** diversspecajn
- ♦ **ekursojn** en belega regiono

Ĝi disponigas al la staĝanoj:

- ♦ **kurso-ĉambrojn**,
- ♦ **salonojn**
- ♦ riĉan **bibliotekon**
- ♦ riĉan **libroservon** kaj **butikon**

L'association à caractère coopératif
 "Maison Culturelle de l'Espéranto"
 fondée en 1951, est propriétaire du
 château de Grésillon et de son parc de
 18 hectares.


Chaque année elle propose :

- ♦ des **cours** de langue internatio-
 nale de divers degrés
- ♦ des **conférences**
- ♦ des **distractions** variées
- ♦ des **excursions** dans une très
 belle région

Elle met à la disposition des stagiaires :

- ♦ des **salles** des cours, ses **salons**
- ♦ une **bibliothèque** importante
- ♦ un riche service de **librairie** et une
boutique

Mairie 09340 VERNIOLE



3 staĝoj

de 27-a de oktobro

ĝis 2-a de novembro 2002

Esperanto por komencantoj

Turismo pluigebla

Koruso

STAĜ-EJO : en feriejo La Freychède

FR - 09300 MONTFERRIER (vidu
reklamon en kongres-libro de 83-a UK en Montpellier)
(novaj gastestroj -- manĝoj sen OGM/GMO-oj)

Venu kun malfermaj okuloj, oreloj, sensoj,
sentoj, sencoj...
por ricegi la staĝon kaj de ĝi ricegi !

HORAROJ : ĉiutage 5 horoj da studado +

ripozo, vizitoj, ludoj, spektakloj, prelegoj,
koncertoj... laŭ viaj afablaj proponoj kaj miaj
zorgaj klopodoj.

AKCEPTO : 26-an de oktobro ekde 15-a horo

STUD-EKO : 27-an de oktobro ekde 8-a 30.

STAĜ-FINO : 2-an de novembro post tag-
manĝo

MEMBRIĜO al CEEA:

(deviga por assekuro kaj pro ĝi (CEEa sendos al
vi 4 numerojn de la loka du-lingva esperanto-buteno
« Esperanto-Pyrénées ») :

- normala : 16 Eŭroj
- paro : 24 Eŭroj
- malpli ol 16-jaruloj : 5 Eŭroj

ALIĜO al in STAĜO : rabatiaj prezoj laŭ
aliĝdato, aĝo, nombro de sama familio

KIUI KIAM	Plen- kresk- uloj	antaŭ 26 jaroj aŭ 2-a persono	antaŭ 12 jaroj aŭ 3-a persono
ĝis 6-a-julio	36 Eŭr	24 Eŭroj	12 Eŭroj
ĝis 26-a-aŭgŭ	48 Eŭr	36 Eŭroj	24 Eŭroj
ĝis 26-a-okto	60 Eŭr	48 Eŭroj	36 Eŭroj

Rimarko : akompanantaj ne-staĝanoj
membriĝu sed ne aliĝu

RESTAD-KOSTOJ :

Tuta restado (en plur-lita ĉambro) :
182 Eŭroj

Tuta restado (sola en ĉambro) :
262 Eŭroj

Tuta restado sen tagmanĝoj : 155 Eŭroj
Nur tagmanĝoj : 70 Eŭroj



ALIĜILO

Voknomo.....
 Familia nomo.....
 Adreso..... Urbo.....
 Poŝt-kodo.....
 Telefon-n^o.....kopilo.....
 Ret-adreso.....

Mi alvenos 2002 oktobre...-an je lahoro
 en La Freychède (Montferrier)
 per propra veturilo kaj povos veturigi.....
 personojn el(urbo)
 trajne ĝis Panniers kaj buse ĝis Lavelanet
 aviadile ĝis Tuhuzo

Mi elektas ĉi-staĝon :
 Koruso
 Eko-turismo
 Esperanto-lernado

Mi jam pagas (per ĉeko al « C.E.F.E.A. »)
 1) Membriĝo al CEEA..... Eŭroj
 2) Aliĝo al in staĝo..... Eŭroj
 3) Restado (antaŭ-pago 10 %)..... Eŭroj
 4) Donaco..... Eŭroj
 5) Sume..... Eŭroj
 Restos por pagi :..... Eŭroj
 Se mi ne partoprenos,
 repageblus aliĝ-kostoj nur ĝis la 26-a de aŭgusto kaj
 restad-kostoj ĝis la 26-a de oktobro.

Sendi aliĝilon, pagon, petojn, proponojn al
 Claude Fressonnet 43 Place du Rumat
 09500 - Mirepoix - Tel (33) (0)5 61 60 18 95
 Courriel : claudefressonnet@wanadoo.fr
 aŭ Jorgos (33) (0)4 68 60 54 17
 jen miaj proponoj :

.....(dankon !)

Prénom.....
Nom.....
Adresse.....
Code Postal Ville.....
N° de tel.....
courriel.....

Je participerai et arriverai le..... octobre
à heures
 directement à Montferrier
 j'ai de la place dans ma voiture pour.....
personnes à partir de(ville)
 par le train en gare de Pamiers (puis en bus
jusqu'à Lavelanet)

Je choisis le stage suivant :

- chant choral
- tourisme durable
- initiation à l'espéranto

Je joins mon règlement : (chèque à l'ordre du CEEA)

- 1) adhésion CEEA..... Euros
- 2) inscription au stage.....Euros
- 3) séjour (acompte 10 %).....Euros
- 4) Don.....Euros
- 5) Total.....Euros

Reste dû :.....Euros
Ne sont remboursables que les frais d'inscription
jusqu'au 26 août et de séjour jusqu'au 26 octobre.

Adressez toute correspondance à

Claude Fressonnet 43 Place du Rumat --
09500 Mirepoix Tel 05 61 60 18 95

Courriel : claudefressonnet@wanadoo.fr
(ou Georges Comte 04 68 60 54 17)

vos suggestions et idées pour les soirées :

.....(merci !)

CEEA (Cercle d'études espérantistes de l'Ariège)

Mairie - 09340 VERNIOLLE

**chant choral / tourisme durable / espéranto
débutants**

**3 stages du 27 octobre au
2 novembre 2002**

**à Montferrier (au pied de Montségur, Pyrénées
Ariégeoises)**

Lieu : Maison de Vacances La Freychède -
09300 Montferrier
(nouveaux gérants - repas sans OGM)

Animateurs, thèmes :

- le stage « **tourisme durable** » (2002 est l'année
de l'éco-tourisme, fêtons-le !) sera guidé par Anne
Ambiès, formatrice professionnelle et militante.
Au menu : aspects théoriques et pratiques sur
différents thèmes : respect du visiteur, de la
population locale, de l'environnement, médiation
culturelle plutôt que " guidage " ...elle utilisera un
vocabulaire accessible aux espérantophones « de
base ».

- le stage **choral** (le 1^{ème} organisé par le CEEA)
sera animé par Petro De Smedt, musicien
carillonneur professionnel flamand, chants
polyphoniques de divers pays et époques
(programme en cours d'élaboration).

- le stage d'**initiation à l'Espéranto** (le 2^{ème}
organisé par le CEEA) sera animé par Rikardo
Cash et s'adresse à des adultes ou adolescents de
plus de 16 ans n'ayant aucune ou peu de notions
de la langue internationale. Oral, écrit, jeux et
divertissements..

Horaires : chaque jour 5 heures de stage, des
sorties et des soirées

Accueil dès le samedi 26 octobre à 15 h

Début du stage le dimanche 27 octobre.

Fin du stage samedi 2 Novembre avec un
concert (par le stage choral) et une conférence
(sur le tourisme et l'espéranto)

Conditions d'inscription :

Adhésion au CEEA : (qui vous offre
l'abonnement à « Espéranto-Pyrénées »,
journal bilingue trimestriel) :

- tarif normal : 16 Euros
- tarif réduit : 11 Euros
- couples : 24 Euros
- enfants moins de 16 ans : 5 Euros

inscription à un stage : tarifs dégressifs
selon la date d'inscription, l'âge, le nombre
de personnes de la même famille

	adulte	- de 26 ans ou 2ème personne	- de 12 ans ou 3 ^{ème} personne
Avant 26 juin	36 E	24 E	12 E
Avant 26 août	48 E	36 E	24 E
Avant 26 octo	60 E	48 E	36 E

Remarque : les accompagnateurs ne
participent pas à un stage sont dispensés des
frais d'inscription

Frais de séjour :

Pension complète : 182 Euros
Pension sauf le repas de midi : 155 Euros
Autre formule : nous consulter
(ex : repas de midi seul : 10 Euros)



VERONA 2002

5a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso

23 – 28 aŭgusto 2002

Eŭeldiva lingva egaleco: rajto de la Eŭropanoj

Organiza komitato:

Verona Esperanto-Grupo, CP 1616, 37100 Verona, Italio

e-poŝto: esperantoverona@adriacom.it p.ĉ.k. 25673328

kasisto: s-ro Sergio Antoniazzi, Via Brigata Casale 1, 37131 Verona Italio

(Al la sama poŝta komitoni povas pagi pere de banko al *Bankoposta, c/n 1,*

ABI 07601, CAB 11700)



Oni povas pagi rekte al la O.K. (per p.ĉ.k. aŭ per ĉeko al la kasisto) aŭ pere de sia Landa Asocio: sendu pagon kaj adigilon al la sama adreso (laŭ fotokopio de la pag-aresto).

VERONA 2002


5a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso

23-28 aŭgusto 2002

Eŭeldiva lingva egaleco: rajto de la Eŭropanoj



AZIENDA
PROMOZIONE
TURISTICA VERONA



AZIENDA
PROMOZIONE
TURISTICA VERONA

VERONA 2002

5a Eùrop-Ŭnia Esperanto-Kongreso

23-28 aùgusto 2002-04-07

"Efektiva lingva egaleco: rajto de la Eùropanoj"

Organiza Komitato: Verona Esperanto-Grupo, CP 1616, 37100 Verona, Italio

e-poŝto: esperantoverona@adriacom.it p.ĉ.k. 25673328

kasisto s-ro Sergio Antoniazzi, Via Brigata Casale 1, 37131 Verona, Italio. (Al la sama

poŝta konto oni povas pagi pere de banko al BANCOPOSTA, CIN L, ABI 07601, CAB 11700)

Oni povas pagi rekte al la O.K. (per p.ĉ.k. aŭ per ĉeko al la kasisto) aŭ pere de sia Landa

Asocio; sendu pagon kaj aliĝilon al la sama adreso (kun fotokopio de la pag-atesto)

Venu al Verono

La Ŝekspira urbo de Julieta kaj Romeo!

La turisma parto estos aparte prizorgata!

ALIGILO

Familia nomo: vito/virino (forstreku unu)
Persona nomo:
Adreso: (nacilingve, latinlitere)
Lando:
Tel.-n-ro (kun prefikso) Faks-n-ro
e-poŝto:

Aliĝ-kotizoj en eùroj

La kotizoj diferencigas laŭ du landgrupoj:

A) Ĉiuj landoj escepte de tiuj sub B (kat. 1, ordinara, kaj 2, reduktita).

B) Iamaj socialismaj landoj de orienta Eùropo; ĉiuj landoj de Azio, escepte de Israelo,

Japanio kaj Korea Resp.; Afriko kaj Latina Ameriko (kat. 3 ordinara kaj 4 reduktita).

Junuloj (ĝis 30-jaraj), kumuloj de kongresanoj kaj handikapuloj pagas reduktitan kotizon

Kategorio 1 (A-ord.) 2 (A-red.) 3 (B-ord.) 4 (B-red.)

ĝis 31 maj. 2002 90 45 54 27 €

poste 100 50 60 30 €

(Infanoj ĝis 10-jaraj kaj akompanantoj de handikapuloj aliĝas senpage)

Mi pagis € por aliĝo en kat. (Ĉe kat. 2 kaj 4 indiku la motivon de la redukto:

junulo - kunulo - handikapulo; forstreku la nevalidajn).

Al la organiza komitato per p.ĉ.k. per ĉeko kontante

Al mia landa asocio

Dato Subskribo

Post dek jaroj eùropaj esperantistoj denove kunvenas en Verono. Tiu kongreso estas organizata de lokaj komitatoj sub la aŭspicioj de Eùropa Esperanto-Ŭnio. Okazos altnivelaj prelegoj kaj debatoj pri la kongresa temo sed ne mankos ankaŭ altitemaj altnivelaj prelegoj;

PROVIZORA PROGRAMO

Vendredo, la 23a de aùgusto

09.30 Gazetara konferenco.

10.00-12.30 / 15.00-18.30 Akceptado de la kongresanoj

16.00-19.00 Unua kunveno de la EEU-komitato (ne publika)

17.00 Inaùguro de ekspozicioj

20.00 Interkona vespero.

Sabato, la 24a de aùgusto

10.00-12.30 Solena kongresa maifermo. Esros invitita la Prezidanto de UEA.

14.00-19.00 Naciaj kunvenoj. Eventualaj aliaj laborkunvenoj.

21.00 Bankedo

Dimanĉo, la 25a de aùgusto

08.30-09.30 Diservo en Esperanto (en preĝejo San Luca aŭ San Zeno)

10.00-12.00 Prof-ro John Wells prelegos pri la kongresa temo

12.00-13.00 Aperitivo

15.00-16.00 Dua kunveno de la EEU-komitato (ne publika)

14.30-16.30 Alpadria ronda tablo

17.00 Malsupreniro de paraŝutistoj en la ĝardenoj de la Arsenalo

18.00 Koncerto de la muzikbando de la Aerarmeo en la ĝardenoj de Arsenalo

21.00 Lirika koncerto

Lundo, la 26 de aùgusto

La tuta tago estos dediĉita al *Romeo kaj Julieta*

09.30-11.30 Prof-ro Humphrey Tonkin, eksa universitata rektoro en Hartford (Usono),

specialisto pri Ŝekspiro, prelegos pri la dramo *Romeo kaj Julieta*.

12.00 Akcepto ĉe la urbodomo de la delegitaroj reprezentantaj la urbojn

ĝemeliĝintajn kun Verono

15.00-18.00 Publika kunveno pri la agado de EEU, raportoj de la EEU-Komitato,

diskuto kaj aprobo de rezolucioj.

18.15-19.30 Recitado en Esperanto de selektitaj pecoj el *Romeo kaj Julieta* de Ŝekspiro en

la korto de la "Domo de Julieta" aŭ de *Mercato Vecchio* ("Malnova bazar").

20.30 *Ni iru vespermanĝi kune kun Julieta*. Servos ĉe la tabloj kelneroj en kostumoj

de la tempo de Julieta kaj akompanos samepokaj muzikoj.

Mardo, la 27a de aùgusto

09.30-11.30 Vizito al la *Nova bazaro de fruktoj kaj legomoj*.

Posttagmeze: Krozado sur la Garda Lago per ekskluziva ŝipo (same kiel okazis en Verona '92)


Merkrredo, la 28a de aùgusto

09.10 Fermo de la kongreso

11.00 Ekskurso al Venecio per trajno - Forveturo de la stacidomo Verona Porta Nuova.

Ĵaŭdo, la 29a de aùgusto

Pluaj ekskursoj por tiuj, kiuj deziras plilongigi la restadon en Verono, se sufiĉe menditaj.



11 RAPORTAS

post la interasocia kongreso de Strasburgo
nova estraro de ESPERANTO-FRANCE

Voĉdonoj :

- la 8 kandidatoj estis elektitaj (novaj komitatanoj **Xavier Godivier** XGodivier@esperanto.org kaj **Jérôme Mathieu** JMathieu@esperanto.org)
- la membrokunveno konfirmis la aliĝon de ĉiuj proponitaj asocioj : *Espéranto-France-Est*, *Espéranto-Midi-Pyrénées*, *Espéranto-Rhône Alpes*, *FET* (laboristoj) kaj *FKEA* (katolikoj).
- Elektiĝis nova estraro kies konsisto estas :
 - * Prezidanto : **Claude Longue-Épée**
 - * Vicprezidanto pri Rilatoj kun la gazetaro : **Bruno Flochon**
 - * Vicprezidanto pri Kulturo : **Claude Nourmont**
 - * Ĝenerala Sekretario : **Olivier Moreau**
 - * Kasisto : **Jean-Louis Texier**
 - * Estrarano - Informado kaj rilatoj kun la federacioj : **Xavier Godivier**
 - * Estrarano - Rilatoj kun la sidejo : **Jérôme Mathieu**

Raportoj pri la laborgrupoj kaj oficialaj kunvenoj aperos en la 2 sekvontaj numeroj de LME.



Pli ol atentinda recenzo... (laŭ kontribuo de Claude PIRON)

... Ĉiam estas utile povi citi lingviston, kiu diras la veron pri esperanto. Tial mi sciigas al vi, ke la germana lingvisto Harald Haarmann pozitive mencias esperanton en sia „malgranda (enciklopedia) vortaro pri la lingvoj... de la albana ĝis la zulu“ (Haarmann, Harald: **Kleines Lexikon der Sprachen: von Albanisch bis Zulu**, Munĥeno: Beck, 2001)

Haarmann nomas esperanton la sola el la “artefaritaj mondaj lingvoj”, kiun lernis ne nur aktivuloj kiel la dua lingvo, sed ankaŭ “multaj mil homoj” kiel gepatran lingvon. Li diras: *‘Kvankam esperanto estis konceptita kiel planlingvo, ĝi nuntempe estas vivanta lingvo (...). Estas nenio nenormala en la fakto klasi ĝin inter la naturajn lingvojn’*. Li komparas ĝin pro la “nedomineco” kun kreolaj, minoritataj kaj diaspora-lingvoj, kiel la jida kaj la romaa (cigana). Li mencias la Unesko-rezolucion de 1985, UEAn, “kun membroj en pli ol 100 ŝtatoj”, la mondajn kongresojn kun po pluraj mil “aktivuloj”, kaj aliajn aferojn, ekzemple ke la londona klubo de 1903 ankoraŭ ekzistas kaj ke la esperantlingva traduko de la Korano estas “agnostata kiel aŭtoritata eĉ de la islamaj fundamentistoj en Irano”, dum ekz. la germanan aŭ la francan “la islamanoj” ne agnoskas.

Fine de la esperanto-artikolo Haarmann konkludas, ke laŭ la amplekso de la esperanto, esperanto plu vivas ol multaj naturaj lingvoj kun simile mulltaj parolantoj, ekz. la friula en Italio, la kimra en Britio, la frisa en Nederlando aŭ la mordvina en Rusio, sed malpli ol la estona.

Laŭ li, la estonteco de esperanto ne plu dependas de agnoskigo kiel oficiala lingvo, ĉar ŝajnas certigita ĝia plua transdonado de unu generacio al la alia, ĉu kiel unua, ĉu kiel dua lingvo. Tamen, laŭ lia opinio, esperanto ne havas realajn ŝancojn kontraŭ la angla, tiel ke la universala utiligo restos verŝajne por ĉiam revo de la esperantistoj.

Ŝajnas, ke Haarmann antaŭe ne estis favora al esperanto, sed la informoj, kiujn havigis al li, i.a. la germana interlingvisto Detlev Blanke, ŝanĝis lian opinion.

SARREGUEMINES ————— ☆

La grupo ĉi jare ne kreskis; Ne plu estas komencanto-kurso; Ĉu nia varbado elĉerpis ĉiujn eblecojn interesigi pliajn lernemlojn en la urbo?

Nia agado lige al UNESKO per dosiero “*Cultivons la Paix*” en mezlernejoj sukcesis en 4 establoj; La dosieron proponas la dokumentalistoj al la legantaro en la lerneja biblioteko dum unu-du monatoj; Ĉar en tiu dosiero menciatas Esperanto, ni proponas dosieron pri nia lingvo kiel donaco al la biblioteko;

Kvar grupanoj partoprenis la Baden-Virtembergan kunveno en Konstanco; Estis agraba travivaĵo.

Fine de junio ni partoprenos piknikon en Dieuze (57) aranĝota de la komnomo; André Wagner, esperantisto kaj vic-direktoro de la tiea kulturdomo invitis nin;

Fremlandajn kontaktojn ni daŭrigas kun Dakar (Senegalio) kaj lernejo en Litovio

Armand HUBERT

57a SAT-Amikara Kongreso = F-VIGY (Moselle)

30/31-03 kaj 01/02-04-2002

Esperanto-Kongreso en la kamparo

Nekutima estas la kadro de la kongreso, kiun travivis esperantistoj de SAT-Amikaro (ĉ. 125) kaj gejunuloj de JEFŌ (ĉ. 25) venintaj ankaŭ el eksterlando : Belgio, Nederlando, Britio, Germanio, Ĉeĥio.

La Centro de ADEPPA (*Association Départementale d'Education Populaire et de Plein Air / Departementa Asocio por Popola Edukado kaj Plenaera Vivo*) de Vigy, vilaĝo situanta je 25 km de Metz, tute taugas por kongresoj sen interpretistoj, kondiĉe ke oni ne estu tro postulemaj pri komforto. Tamen la nutraĵo estis bongusta kaj sufiĉa, la personara afabla kaj servopreta. La suno forestis nur sabate sed brile ĉeestis la ceterajn tagojn. Tre sukcesa estis la librovendado, tiagrade ke mankis i.a. ekzempleroj de la libro de Georges Kersaudy "*Langues sans frontières*" (*Lingvoj sen landlimoj*), kaj de la "*Praktika Vortaro Franca-Esperanta / Esperanta-franca*" de SAT-Amikaro por kontentigi ĉiujn aĉetantojn.

Georges Kersaudy kaj Henri Masson dediĉis siajn respektivajn librojn kaj povis dialogi kun la partoprenantoj. Eksterordinara estas Georges Kersaudy, kiu povis alparoli ĉiujn fremdajn kongresanojn en ilia propra lingvo, inkluzive la ĉeĥan kaj la slovakon, kaj senfine rakonti anekdotojn, kompari esprimojn de unu lingvo al la alia. Li konas fakte pli ol 50 sed ja diversgrade. Male, nula estis la ekstera informo efiko. Neniu ĵurnalisto. Ankaŭ sen konstatebla pozitiva efiko estis debato kun ne granda publiko, okazinta en granda magazeno de aŭd-vida materialo kaj libroj "FNAC" de Metz, pro la ĉeesto de ekscititulo, kiu senĉese ripetis, ke Esperanto estas utopio, ke ĝi estas formo de sinkretismo (kompleksa kaj konfuza miksaĵo de diversaj ideoj), kaj ke ĉiuj sinkretismoj, religiaj, politikaj, ideologiaj, fiaskis, ktp. Kiam li fariĝis pli afabla kaj kvietita, li agnoskis la belecon kaj pravecon de nia agado, jam estis preskaŭ la fino, kaj tiam plejparto el la publiko (eble entute ĉ. 25 personoj, kiuj restis pli malpli longe) jam estis for. . . La rezulto estas, ke tie vendiĝis neniu libro. . .

La programo de prelegoj povis kontentigi ĉies gustojn : pri *Ekoturismo* (Petro Ĉrdle, Ĉeĥio), pri *uzo de Esperanto en Komputiko* (André Grossmann) kaj *Interreto* (Bruno Masala), pri *Uneska Kampanjo* (Armand Hubert), pri *ATTAC* (Catherine Roux). La *Amikeca Reto* (vojaĝservo de SAT), prezentis kaj vendis sian novan adresaron de la jaroj 2002-2003 (400 adresoj en 54 landoj; ĝi estas akirebla ĉe bonaj libro-servoj kontraŭ 10 eŭroj au ĉe : AMIKECA RETO 88, rue Victor Hugo FR-37400-AMBOISE (a. reto@france-association.com <http://www.creaueb.fr/a.reto>). La *Filatela Servo* de SAT havis sian budon sub prizorgado de Modesto Ramelli. Neesperantistaj organizoj estis ankaŭ invitataj prezenti budojn : *Amnestio Internacia*, *Artisans du Monde* (metiistoj de la mondo, por komerco inter Nordo kaj Sudo), *ATTAC*, *Confédération Paysanne* (progresema kamparana sindikato), kiu havas ankaŭ paĝon en Esperanto ĉe <http://www.confederationpaysanne.fr>.

La programo de spektakloj konsistis el kanzonoj en pluraj lingvoj, inter kiuj Esperanto, de la duopo "*Mannijo*" (Manfred kaj Jo, prononci manijo) kaj de Jak Le Pul, konata en la Esperanto-medio.

La debatoj pri la irado de la asocio estis tre konstruaj. Forta volo manifestiĝas por doni impeton al la Asocio. Ĉiusemajne, ekde la mardo 9-a de aprilo ĝis la sabato inkluzive, kaj de la 14-a ĝis la 18-a horo, efektiviĝos deĵorado po du personoj en la nova pariza lokalo kiu fariĝos oficiale la sidejo post administraj klopodoj. Projekto de kompleta renovigo de la asocia organo estas envojigita, pli ampleksa, pli moderna, pli enhavoriĉa.

Un congrès d'Espéranto à la campagne

Les espérantistes de *SAT-Amikaro* (env. 125) et les jeunes de *JEFŌ* (env. 25), venus aussi de l'étranger: Belgique, Pays-Bas, Grande-Bretagne, Allemagne, République Tchèque, ont tenu leur congrès dans un cadre inhabituel.

Le Centre de l'ADEPPA (*Association Départementale d'Education Populaire et de Plein Air*) de Vigy, village situé à environ 25 km de Metz, convient parfaitement pour des congrès sans interprètes à condition de ne pas être trop exigeants sur le confort. Cependant, la nourriture est bonne et suffisante, le personnel est aimable et serviable. Le soleil n'a été absent que le samedi mais a brillamment fait acte de présence les autres jours. Et puis le vin de Moselle, chanté par Jacques Brel, est délicieux. Les gens ne savent pas ce qu'ils perdent à ne regarder que vers le sud.

La vente de livres a connu un grand succès, à tel point que des exemplaires ont manqué, par exemple pour le livre de Georges Kersaudy "*Langues sans frontières*" et le "*Dictionnaire Pratique français-espéranto / espéranto-français*" de SAT-Amikaro pour satisfaire tous les acheteurs. Georges Kersaudy et Henri Masson ont dédié leurs ouvrages respectifs et ont pu dialoguer avec les participants. Georges Kersaudy est vraiment un homme extraordinaire qui a pu s'adresser à tous les congressistes étrangers dans leur propre langue, y compris en tchèque et aussi en slovaque. Il est intarissable lorsqu'il s'agit de raconter des anecdotes ou de comparer des expressions d'une langue à l'autre. Il connaît en fait bien plus de 50 langues mais, certes, à divers degrés.

Au contraire, l'efficacité a été nulle sur le plan de l'information: aucun journaliste. Sans effet positif aussi a été un débat avec un public limité qui a eu lieu dans le magasin d'audio-visuel et de librairie de la FNAC de Metz à cause de la participation d'un excité qui répétait sans arrêt que l'espéranto est une utopie, que c'est une forme de syncrétisme et que tous les syncrétismes religieux, politiques, idéologiques ont échoué, etc. Lorsqu'il est devenu plus aimable et tranquille, lorsqu'il a reconnu la beauté et la justesse de notre action, c'était déjà presque la fin et la plus grande partie du public était déjà partie (env. 25 personnes qui sont restées plus ou moins longtemps). Le résultat est qu'aucune vente de livre n'a pu avoir lieu.

Le programme des conférences pouvait satisfaire tous les goûts: sur l'Écotourisme (*Petro Ĉrdle*, Rép. Tchèque), sur l'utilisation de l'espéranto en informatique (*André Grossmann*) et sur Internet (*Bruno Masala*), sur la Campagne de l'Unesco (*Armand Hubert*), sur ATTAC (*Catherine Roux*).

L'*Amikeca Reto* (Réseau d'amitié: service voyage de SAT), a présenté et vendu son nouveau recueil d'adresses 2002-2003 (400 adresses dans 54 pays: 10 euros auprès de l'AMIKECA RETO 88, rue Victor Hugo FR-37400-AMBOISE... courriel a.reto@france-association.com. <http://www.creaweb.fr/a.reto> à condition de connaître l'espéranto

Le Service Philatélique de SAT avait sa table tenue par *Modesto Ramelli*. Des organisations non-espérantistes ont aussi été invitées à tenir un stand: *Amnesty International*, *Artisans du Monde*, *ATTAC*, *Confédération Paysanne* qui a aussi une page web en Esperanto sur <http://www.confederationpaysanne.fr>.

inkluzive, kaj de la 14-a ĝis la 18-a horo, efektiviĝos deĵorado po du personoj en **la nova pariza lokalo**, kiu fariĝos oficiale la sidejo post administraj klopodoj. Projekto de kompleta renovigo de la asocia organo estas envojigita, pli ampleksa, pli moderna, pli enhavoriĉa.

La gajnanto de la ĉefpremio de la loterio estas tre bona lernanto de Marc Noulin, Sébastien Merlet, 18-jara, kiu havas elekteblecon inter senpaga vojaĝo al la SAT-kongreso 2002 de **Alicante**, aŭ senpaga ricevo de libroj aŭ servoj de SAT-Amikaro ĝis sumo ekvivalenta. Li estas la lasta gajnanto de tiu servo kiu malaperos.

Novaj aliĝoj registriĝis dum la kongreso. Por tro multaj esperantistoj, kiuj malkovras ĝin unufoje, SAT-Amikaro aperas fakte tute alia ol tio, kion ili imagis. S-ro Georges Kersaudy jam komence de la jaro aliĝis al la Asocio.

La *Organiza Kongres-Komitato* montriĝis efika, ĉiam helpopreta, afabla. Estas notinde, ke grandan kompetentecon pri elekto de turismaj celoj kaj gvidado havas unu el la OKK-anoj, s-ino **Catherine Gallego**, kies laborlingvoj, kadre de la turisma servo de Metz, profesie, inkluzivas Esperanton. La urbo Metz nekontesteble meritas viziton. **Raymond Schwartz** havis lokon en la programo de la prelegoj, kaj estas pravigita espero, ke memorplako estos iam fiksita sur la domo, kie li naskiĝis, kaj strato de lia naskiĝurbo verŝajne ricevos lian nomon. Lia filino partoprenis en la kongreso.

En 2003, SAT-Amikaro kongresos en **Cap d'Agde**, ne tre malproksime de Montpellier kaj ĉefe de Sète, kie okazas someraj internaciaj Esperanto-staĝoj (vidu: <http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>). Por 2004 envidiĝis la asocio *Esperanto-Vendée* por organizado de kongreso en **La Roche-sur-Yon**, kaj estas principa konsento por kunorganizado de kongreso en norda Francio, en la jaro 2005, eble eĉ en **Bulonjo sur Maro**, en kiu partoprenus ĉiuj Esperanto-organizoj de Francio.



SERVICE DE PRESSE DE SAT-AMIKARO / GAZETARA SERVO DE SAT-AMIKARO. Inscription à la liste de diffusion sur simple demande. Enskribiĝo al la dissendo listo laŭ simpla peto;

Rédacteur/Redaktanto: Henri MASSON
esperohm@club-internet.fr = <http://www.esperanto-sat.info>



Le programme des spectacles consistait en des chansons en plusieurs langues dont l'espéranto interprétées par le duo "**Manniĝo**" (Manfred et Jo) et par **Jak Le Puil**, connu dans le milieu de l'espéranto.

Les débats sur la marche de l'association ont été constructifs. Une forte volonté se manifeste pour donner une impulsion à l'association. Chaque semaine à partir du mardi 9 avril jusqu'au samedi inclus, une permanence sera assurée de 14 à 18h par deux personnes dans le **nouveau local parisien** qui deviendra officiellement le siège après des démarches administratives. Un projet de renouvellement complet de la revue plus ample, plus moderne, plus riche par le contenu a été mis en route. Le gagnant du principal prix de la loterie est un bon élève de Marc Noulin (Loir-et-Cher), Sébastien Merlet, 18 ans, qui a le choix entre le voyage gratuit jusqu'à Alicante (Espagne) pour le congrès de SAT ou la somme équivalente pour le paiement de services de SAT-Amikaro (cotisation, service librairie). Plusieurs nouvelles adhésions à SAT-Amikaro ont été enregistrées durant le congrès. Pour de trop nombreux espérantistes qui découvrent SAT-Amikaro pour la première fois, l'association apparaît en fait tout à fait différente de ce qu'ils imaginaient. Georges Kersaudy a d'ailleurs réalisé un souhait déjà ancien en adhérant au début de l'année.

Le Comité d'Organisation du Congrès s'est montré efficace, toujours disponible pour aider, aimable. A noter la grande compétence dans le choix des buts d'excursions et des visites guidées par un des membres du Comité, **Mme Catherine Gallego**, dont les langues de travail, dans le cadre de l'Office de Tourisme de Metz, incluent l'espéranto. La ville de Metz mérite incontestablement la visite. Le romancier et humoriste espérantiste Raymond Schwartz, qui y est né, a eu sa place dans les programmes de conférences et d'animation, et l'espoir qu'une plaque commémorative sera fixée sur sa maison natale paraît justifié, de même que l'attribution de son nom à une rue de Metz (sa fille a assisté au congrès).

En 2003, SAT-Amikaro tiendra son congrès au **Cap d'Agde**, pas très loin de Montpellier et principalement de Sète, où se tiennent des stages internationaux d'été d'espéranto:

(<http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>). L'assoc. *Esperanto-Vendée* s'est mise en ligne pour l'organisation du congrès à **La Roche-sur-Yon en 2004**, année du bicentenaire de la ville, et un accord de principe a été accepté pour la coorganisation d'un **congrès par toutes les organisations françaises** d'espéranto dans le nord de la France en 2005, vraisemblablement à **Boulogne-sur-Mer**, pour le centième anniversaire du congrès qui s'y était tenu pour la première fois au monde en 1905.

SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kongresos en Svislando en 2003

Okaze de sia lastatempa vizito en Ĉaudefono, la ĝenerala sekretario de SAT, **Kreŝimir Barkoviĉ**, konstatis la taŭgecon de la kongresaj ejoj, proponitaj de KCE (Kultura Centro Esperantista) por la jaro 2003, rezulte de la esploroj faritaj precipe de Francisko Degoul kaj Giorgio Silfer, membroj de la organiza komitato.

La ĝenerala sekretario konstatis ankaŭ la oportunan konsiston de la lokaj laborfortoj: la efektive interesitaj ĉeestis aŭ skribe senkulpiĝis. Krom Degoul kaj Silfer, en la OKK pormomente estas David Buhlmann, Perla Martinelli, Dieter Rooke. Aliaj estos kunvokitaj al la unua kunsido de la OKK, sabaton la 15an de junio.

Tiu kunsido difinos la unuan bultenon de la 76a SAT-kongreso, prezentotan en Alikanto. La dato mem estas jam fiksita: en Ĉaudefono, **12-19 julio 2003**.

SAT ree kongresas en Svislando post 22 jaroj: lastfoje en Bazelo, 1981. En Svislando okazis ankaŭ pluraj Universalaj Kongresoj (lastfoje en 1979), sed neniu Inter-Junulara Kongreso.

... mia itinero tra fruktodona kongreso ...

VIGY

30an de marto / 02an de aprilo

Ginette MARTIN



Pro la fakto, ke Simone kaj mi deziris trapasi ekzamenon, ni devis esti en Vigy je la naŭa matene; Do, mi venis ĉe Simone vendrede vespere, manĝis ĉe ŝi, dormis ĉe ŝi, kaj ni ekiris sabate matene en frua horo, je la sesa kaj duono; mi estis la ŝoforo; La vojaĝo agrable pasis, en sufiĉe bela vetero, sen multa trafiko, en la lumo de bela mateno

Ni babilis esperante dum la tuta vojaĝo por ekzercadi. Ni facile trovis la staĝ-lokon (aŭ kongres-lokon) en trankvila vilaĝo, inter la kampoj, meze de naturo. Tuj ni trovis lokon por aŭtomobilo sur la parkejo kaj tute proksime la grandan komunan domon, kiu entenis akceptejon, restoracion, libro-servojn en grandega salono, kaj salonetojn por la ekzamenoj. Simone kaj mi apenaŭ havis tempon por saluti kaj trovi la ekzamen-salomon.

Ni estis sep kandidatoj por la ekzamenoj, inter ili Marcel Redon, bone konata de ni. Ĉar ĉiuj el ni deziris trapasi la duan gradan ekzamenon, kaj neniam antaŭe trapasis la unuan, estis decidite ke ni devos trapasi antaŭ-teston pri gramatiko por rajti trapasi la deziratan. Mi faris rapide la skriban teston, kaj rajtis promeni ekstere ĝis la fino de la tempo por la aliaj, kaj ĝis la korektado de la ekzercoj, far la ekzamenantoj. Mi profitis por demandi mian ŝildeton kaj informiĝi pri mia ĉambro. (Niaj sakoj estis en la aŭto ĝis ebleco porti ilin en la ĉambrojn). La ekzamenoj estis ekster la normala programo, do ni povis enskribiĝi sen la bedaŭro eventuale maltrafi interesajn aranĝojn. Pro tio mi benas la organizantojn de *Sat-amikaro* pro tiu simpatia deĵorado de la korektantoj en malplenaj trankvilaj horoj.

Post momento, la ekzamenantoj venis al ni, kaj anoncis ke, krom unu, ni rajtas provi la sekvantajn taskojn : resumi tekston post dufoja aŭskultado, respondi al demandoj laŭ kompreno de alia teksto (skribita), kaj fine verki pri temo elektita inter tri. Mi elektis verki pri: *"Ĉu la sporto estas bono aŭ malbono por la homoj?"*. Simone elektis verki pri: *"Ĉu vi preferas urbon aŭ kamparon?"*

Fine ni povis manĝi, ĉar estis tagmezo, (Simone kaj mi rajtis manĝi nian piknikon en la restoracio kaj ni aĉetis nur trinkaĵojn), kaj estis anoncite, ke la sukcesintoj de la mateno devos trapasi la parolan parton je la dek tria kaj duono. Fakte ĉiuj estis akceptitaj por la parola parto. Por tiu testo, ĉiu kandidato devis subiĝi al la ekzameno sole kun du spertuloj, kiuj taksas la nivelon. En du salonetoj okazis la testadoj, kaj mi petis trapasi antaŭ ol la aliaj ĉar mi devis deĵori ĉe la infanoj posttagmeze. Je la dek kvara, mi estis libera kaj povis alporti materialon ĉe la saloneto por infanaj kursoj, kiun Catherine Gallego pretigis por mi.

La infanoj ne abundis. Komence mi estis sola kun Gérôme, poste venis Mélanie, kaj ni okupiĝis en la traduko de facilaj bild-strioj. Dum la paŭzo, la infanoj provis la svingilojn, kaj la diversajn eksterajn amuzilojn, poste ni iris piede ĝis la "domo" atribuata al la gejunuloj. En ĝi ni trovis bebo-litetojn, bebo-seĝojn, kaj suĉ-botelojn.

Lucie, la fratino de Gérôme, deĵoris kun alia junulino. *"Kie estas la gejunuloj?"* mi demandis. *"En promenado, ili iras piede, kaj jam foriris"* - *"Kaj la beboj?"* - *"Ili marŝas, aŭ la adoltoj portas ilin, unu dormas ĉi-tie, en la apuda ĉambro."* La domo de la gejunuloj multe plaĉas al Gérôme kaj Mélanie, kiuj komencas ludi per vezika pilko. - *"Ne faru bruon ĉi-tie, petegis Lucie. La bebo ne parolas france, kaj se li vekiga, ni ne konas la lingvon por konsoli lin"*. Brava Lucie! Ni eliras por ne meti ŝin en problemon.

Revenante al nia kurso-domo, ni renkontas unu plian knabinecon kun sia avino. Mi proponas, ke ŝi venu kun ni, kaj informas pri la loko. Ŝi ne ŝajnas tre entuziasma, sed post momento ŝi revenas kun alia knabino, do ni povas fari pli interesajn ludojn kun Caroline kaj Lucile.

Rapide venas la momento de la vesper-manĝo, estas mem-servado, kaj ni "pagas" per kuponoj. Ĉiam bonas por ĉiuj la momento de la manĝo, kaj ni vere bone manĝas, bone babilas, bone ridas. Neniu krokodilas apud mi, ĉar mi principe parolas esperante; mi rimarkis ke, kiam oni demandas esperante, oni aŭtomate respondas esperante, kaj kiam oni demandas france, aŭtomate oni respondas france. Gravas doni bonan ekzemplon.

Post manĝo, mi ĉeestas la prelegon de sinjoro Kersaudy, kiu estas ege interesa kaj inform-riĉa, kaj ankaŭ sprita. Vere brila prelego. Li elektis prelegi france, kvankam li regas esperanton, ĉar plejparte la aŭskultantaro estas franca kaj duono da ili ne sufiĉe regas esperanton por ĝui la tuton. La fremduloj estas malmultnombraj, do la perdo ŝajnas malpli granda, tamen la morgaŭan matenon, Nederlandano plendis, ke li ne povis ĉeesti pro nekono de la franca, kaj ke estas granda miso ne esti uzinta la esperantan. Li do iris dormi. Eble, li povis sidi apud Franco, kiu tradukus esperante. Mi mem ne kapablus, ĉar kiam mi tradukus frazon, intertempe alia frazo aldoniĝus, kaj kion fari?

Venas la momento dormi, kaj ni scias, ke ni dormos unu horon malpli pro la printempa ŝanĝo de horo. Simone kaj mi jam serĉis niajn ĉambrojn post la parola ekzameno. Bedaŭrinde en la domo "unu", ni vidis nur prelego-ĉambrojn aŭ kurso-ĉambrojn, en kiuj homoj atente aŭskultis la gvidantojn. Ni hontis ĝeni, kaj ni revenis retroen, kaj serĉis solvon en la domo "unu bis". En tiu domo, ni trovis pli taŭgan situacion. Jes, ekzistis ankaŭ kurso-ĉambroj, sed apud ili, sen ĝeni la kursojn, ni trovis la deziratajn ĉambrojn 9 kaj 12. Ili estas fermitaj, sed verŝajne niaj samĉambroj prenis ŝlosilon kaj ni povos eniri vespere. Ni metas niajn sakojn en la kurso-ĉambro de infanoj. Certe, la organizantoj eraris, ni opinias. Vespere, ni devis konstati, ke ne estas loko por ni en la antaŭviditaj ĉambroj "*Vi eraras*" diras ĝentile la okupantoj, "*iru al la domo unu*". Jes, ankaŭ en la domo "unu" estas ĉambroj 9 kaj 12, sed kiel ni povis imagi posttagmeze, ke ni devas trapasi la kurso-salonetojn kaj trovi la pordojn de niaj ĉambroj malantaŭ la dorso de la kurs-gvidantoj. Jes, vespere, la kurso-ĉambroj senhomaj, kun flankenmetitaj seĝoj, iĝas banalaj koridoroj. Ne gravas la eraro, ni bone dormis...

Dimanĉe matene, mi denove okupiĝas pri la infanoj, kun unu malplia, G r me, kiu deziras resti kun la gejunuloj, kaj unu plia, kiu estas Meva. Denove ili estas kvar, bona nombro se oni volas bone zorgi pri ili, rigardi kune albumojn (Mi ĵus ricevis belegan kun valoraj bildoj de finnlanda amikino) kaj la nombro de infanoj estas sufiĉa por organizi ludojn: loto-ludon kaj detektiv-ludon. Ni ne forgesas ludi ekstere dum la paŭzo kaj provi la grimpludojn. Jam la fino de la mateno, kaj la infanoj ŝajnas bedaŭri, ke estas la fino de mia deĵorado ĉe ili.

Mi proponas ke, se ili enuos posttagmeze, mi zorgos pri ili de la dek kvara ĝis la dek sesa, pro escepta favoro al agrablaj infanoj. (En la fundo de mi-mem, mi pensas ke eble la infanoj ne venos, kaj ke mi iros ekskursi)

Post la komuna foto, kaj denove la plaĉa komuna manĝo, mi komencas alporti parton de miaj sakoj al la veturilo. (Simone, kiu enskribiĝis por tri tagoj, revenos per alia rimedo), kaj kion mi vidas?... Miaj infanoj de la mateno, kiuj ĝoje iras piede al ĝoja celo, en la grupo de gejunuloj, kun kelkaj patrinoj. "*Ni iras al biciklo-ĉaretoj sur reloj*", ili diras, "*mur M lanie ne volas veni!*". "*Sed mi ne volas resti sola kun M lanie!*", mi diris, *mi provos persvadi ŝin kaj ni venos kun vi.*" Dirite, farite. Mi informas la patron de M lanie, por ke li ne serĉu ŝin, mi prenas M lanie en mian aŭtomobilon por kuniĝi pli rapide al la piediranta grupo, kaj la bela aventuro komencas.

Sep biciklo-ĉaretoj atendas la grupon en la malnova staci-domo. La ridema grupo grimpas sur la ĉaretojn, kaj ek al la aventuro!! Ni estas ĉirkaŭ tridek: infanoj, junuloj, patrinoj, avinoj, vere petola grupo. Kia genia ideo, tiu sporta promenado tra la kampoj sur malnova trako, en radianta printempa suno, inter la heĝoj de ekflorantaj arbustoj. Ĉio verde milde verdas aŭ blankas pro floroj. Ni veturas je la rapideco de 10 km en horo, eblas profunde ĝui la pejzaĝon, spiri la freŝan aeron, eblas ŝerci, babili, rivali en rapideco por malforte puŝi la antaŭan ĉareton, kuri apud la vojo por preterpasi la surĉaretajn amikojn kaj moki ilin, suriri de unu ĉareto al la alia, ktp....

Eblas saluti la loĝantojn de la vilaĝoj aŭ la aliajn amatorojn de tiuj biciklo-ĉaretoj, kiuj devas por momento flanken porti sian ĉareton, kiam ni renkontas ilin, vojirantaj en la inversa direkto. Ĉiuj faras sen grumbli, estas la regulo de tiu simpatia sporto, kaj la geniaj ĉaretoj ne estas tro pezaj. Ni povas iri kvarope aŭ kvinope sur unu. Du personoj pedalas, alte sidantaj sur kvazaŭ-bicikloj, unu dekstre kaj unu maldekstre, du aliaj en la mezo sidas sur fiksitaj seĝoj, unu plia povas sidi sur la planko aŭ stari tenante la horizontalan stangon, kiu ankaŭ estas la apogilo por la manoj de la pedalantaĵoj. Ni alterne pedalas, mi konstatas, ke tio ne estas tro peniga, ankaŭ infanoj povas efiki sur tiuj maŝinoj, la tuto el fero estas tre solida. Du horojn kaj duonon daŭras la paradiza promenado, ni vojiris 11 km en unu direkton kaj 11 km revenen. La deklivo estis milda. Vere plezurega afero!! Mia plej bona memoraĵo de la du tagoj en Vigy!!

La aliaj dumtempe sidas en kunvenoj, kelkaj estas veraj ŝatantaj de kunvenoj, diskutoj, projektoj. Kelkaj vizitas Metz kun la ĉiĉeronino Catherine. Mi nur bedaŭras, ke kelkaj personoj kun juna aspekto ne partoprenis la programon de la gejunuloj, kiuj promenis, mem kuiris por si, organizis la promenadon per biciklo-ĉaretoj. Kiam mi demandis, kial ili ne estas kun la gejunuloj, ili respondis ke ili ne estas sufiĉe spertaj en esperanto kaj devas unue studi en la kursoj. Al tiuj-ĉi junaj personoj mi deziras rapidan lernadon, por ke ili povu ĝui la bonegajn programojn de la gejunuloj en estontaj staĝoj.

Konklude, tiu komuna funkciado de tri asocioj estis vere bonega afero. La miksiĝo de diversaj fontoj de aliĝantoj estis vere riĉiga sperto, mi havis multajn interesajn diskutojn kun multaj diversaj homoj. Mi ankaŭ ŝatis la miksaĵon de infanoj, junuloj, maturaj homoj, blankharuloj (sed junaj en la koro). Dankon al ĉiuj, kaj ni rekomencos similan aliafoje, ĉu ne?

Ginette MARTIN

Li rakontas al amiko :

'Kiam mi estis pli juna kaj daŭre fraŭlo, mi malŝatis ĉeesti edziĝofeston... Tiam miaj gepatroj kaj maljunaj onkloroj alproksimiĝis kaj ĝoje frapis sur mian ŝultron prognozante: Nu, jen via vico! Tion vi baldaŭ spertos! Tiun malhonan ŝercon ili ĉesigis, kiam mi samgeste reagis je ili okaze de.... funebraĵoj!'

Du amikinoj renkontiĝas...
"Lasian semajnon mi feris en Saint-Tropez, kaj mi subite trafis vian edzon en restoracio!... - Mian edzon, en St-Tropez?... Sed li devis veturi al Lille por solvi ian profesi-problemon!... Kia neatentema stiranto!... Se mi ne apude sidas en la veturilo por helpi, li ne kapablas legi voj-mapon !... "

Juna studentino feritempas en kampara vilaĝo kaj haltas antaŭ bovino, kiu kares-lekas la muzelon de sia eta ido...
 La farmisto, iom timema, alproksimiĝas kaj duonvoĉe flustras :
" Nu, mi vere tutsame ŝatus fari... - Sed kiu ĝenas vin ? Ĉu tiu bovino ne apartenas al vi ?.. "

Baden-Virtemberga kongreso en Konstanco, ĉe la lago, (Germanio), la 26 ĝis 28-ajn de aprilo 2002.

KONSTANCO kaj ESPERANTO / VOLAPUKO.

Skipo el Sarreguemines alvenis la kongresan domon je la 10-a horo de sabato, la 27-an, kaj sidigis en sepdekkapa rondo.

Jam prelego disvolviĝis pri Volapuko. Ĉu eraro en esperanto-kunveno? Neniel! Ni eksciis ke Johann Martin Schleyer, katolika pastro, restadis en Konstanz dum la pli granda parto de sia vivo. Li publikigis en tiu urbo sian projekton de planlingvo por promocii interkompreniĝon cele de favori pacon inter la popoloj.

Lin do indas konsideri kiel la inicianton de tiu ideo kiu ankaŭ en la Zamenhofa kapo floris. Volapuko fosis la sulkon de internacia pacfavora helplingvo : Esperanto trovis en volapukista aro tiun subtenon kiu permesis tujan ampleksiĝon.

Nun ĉar Schleyer verkis multajn religiajn lirikaĵojn, ĉar li suferis persekuton pro sia fideca agado, lin intencas beatnومي la Roma Eklezio. Internacia komitato en esperantio apogas tiun celon.

La horon antaŭ la tagmezo plenigis klerigo pri la libro "Badenlanda legendaro" de Benoît Philippe. Pastro Bernhard Eichkorn prezentis tiun verkon kaj ties aŭtoron kiu studis kaj diplomiĝis ĉe universitato Konstanco. Li legis kaj komentis eltiraĵojn kiuj rilatas al la kreo de setlejo nomiĝinta laŭ romiana imperiestro, *Konstanc*.

ARMENA ETOSO

Armena kantista duopo alportis internacian tuŝon al vespera kunesto.

La gitaristo Stepan prezentis popolkantojn kaj Lida popoldancon. Per esperantlingva prelego Lida prezentis sian landan kulturon kaj historion.

Pro dekoj da invadoj dum du mil jaroj far de najbaraj potenculoj, pro genocido la plej granda parto de Armenoj vivas dise alilande. Armenio nun estas sendependa ŝtato. Tiu lando aparte rimarkindas pro propra arkitekturo, murpentraĵoj kaj tapiŝoj. La plej malnovaj kristanaj preĝejoj situas tie: ek de la VI-a jarcento kristanismo estis ŝtata religio.

La pluvivon de tiu popolo ĉirkaŭita de malamikoj savis ĝia kulturo streĉe konservata. Aparta skribmaniero miljara subtenas lingvon kiu estas la ŝirmilo de armena identeco diaspore.

Esperanto bonfartas en Erevan, la ĉefurbo.

KONSTANCO PROMENANTE.

Poste Thomas Schütz ĉiĉeronis multnombran aron por viziti sian naskiĝ-urbon. Ĝia situo ĉe la lago plaĉas al turistoj pro ampleksa panoramo kaj agrablaj promenejoj. Antikvajn restaĵojn oni malkovras en multaj stratoj kiam iu domo malkonstruiĝas: romianajn murojn oni pliuze ĉie. Preĝejoj multas; ili respregulas la mezepokan gravecon de la urbo pro koncilio kaj Reformacio.

El Konstanca esperantlingva flugfolio :

Kelta fiŝista setlejo iĝis urbo kiu atingis armean signifon dum la romiana regado. Dum la jaroj 1414 - 1418 la mezepoka reform-koncilio okazis tie en la konstruaĵo "*Koncilium*". Tie kunvenis la lasta konklavo de diversaj katolikaj partioj por finfine elekti kardinalon Otto Colonna kiel ununuran papon - *papon Martin V-a*, - post gravegaj kvereloj religiaj.

Sur la loko de disfalinta romiana kastelo, oni konstruis de 1052 ĝis 1089 romanikan kolonan bazilikon. En ties kripto videblas ora disko "*Majestas Domini*", unika trezoro de la kristana mondo el la tempo ĉ. 1000.

KONSTANCA ĈIRKAUAĴO

La tuta dimanĉotago estas dediĉita al vizito de la insulo Mainau. Tiun florinsulon oni povas viziti dum ĉiu monato de la bela sezono. Preferendas printempe kiam ankoraŭ ne zumadas troa amaso da ŝatantoj: 2 milionoj da vizitantoj jare. Riĉaj florbedoj kaj jarcentaĝaj arboj mirigas la promenantojn. Inter la sescent specoj da tulipoj, neniuj sukcesis ekvidi tiun, kiu nomiĝas "Esperanto".



Reĝino de tiu insulo estas la rozo dum la someraj monatoj. Alia simbolo, la oranĝo-arbo.

Nepre trairu la papilibredejon kaj spertu ekzotikan etoson en giganta forcejo!

El supraĵo la promenanto ĝuas la panoramon de la lago kaj fone la blankan dentomuregon de la Alpoj en Svislando.

La posttagmezo finiĝis kiam la esperanta grupo retroŝipis al Konstanco. Dum unu horo la pasaĝerojn lulis komforta ŝipo sur gaje plaŭdanta lago. Ĉe l'horizonto majesta montaro invitis al silento kaj al enmemorigo de tiu paciga vidaĵo.

Tiun Bavelan kunvenon ni ravite travivis dank'al Esperanto, al eksterordinara loko kaj ... al la juna esperantogrupa de Konstanco.

A. Hubert



La libroservo de Esperanto France-Est prezentis sian riĉecon dank' al Jean-Luc kaj Grazina Thibias el Nancy. Eĉ la jam granda Mélanie deĵoris ĉe la montrotablo.

Raymond SCHWARTZ en sia hejmo dum SAT-AMIKARA KONGRESO

Per prelego de S.ro Eddy Borsboom, la SAT-Amikara kongreso 2002 en Vigy celebris la lorenan verkiston.

Raymond Schwartz naskiĝis en METZ (57), en 1894, kiam Loreno estis sub germana gubernio. Lia gepatra lingvo estis la franca, sed lia klerigado fariĝis en germanlingvaj lernejoj. Kiam li estis 15-jara, li eklernis Esperanton, tiel li fariĝis trilingvulo.

Notinde ke li verkis nur per la internacia lingvo.



Schwartz elektis dubeman sintenon fronte al okazantaĵoj : ankaŭ Esperanton li aliris iel skeptike. Per restado en barcelona esperanta medio, li spertis la taŭgecon de la lingvo kaj tiam dediĉis sian liberan tempon al ties praktikado verkante. Schwartz ne multe partoprenis la asocian vivon en Parizo : ne vojaĝis, ne renkontis ampleksan esperantistaron. Li estis studĉambra verkisto,.

La Lorenano, internacie konata dank'al Esperanto, okupas prilumitan lokon en la vico de la esperanta verkistaro. Post la klopodo de Zamenhof, Grabowski, Kabe, Baghy kaj aliaj por doni al la lingvo beletran staturon, Schwartz forigis la melankolion sur la esperanta bretaro per siaj humuraĵoj. Li iniciis la vortludon kaj uzis la humuran manieron kiuj floris en la francaj eldonaĵoj, ĉu enlibra, ĉu engazeta.

Lia vidpunkto iĝis prefere ridpunkto.

Li eltrovis insultvortojn : tio estis novaĵo en la movado! Li ankaŭ estis verkisto sur tiu unika tereno de kabaredaĵoj kiu estas kutima flanko de la franca literaturo. Lia kontribuo estas tiel specifa ke oni parolas pri "ŝvartsaĵoj" por difini liajn specifajn humurajn eltrovaĵojn.

Franca fono de esprimoj kaj de enhavo streĉe ligas liajn verkojn al la franclingvaj. Kvankam liaj ĉiu-jaraj kronikoj por Sennacieca Revuo pravas universalecan observadon, Schwartz estis hejmecca verkisto. La universaleca skribmaniero de Peĉ aŭ de Ŝtimec estos alia kaj plia ŝtupo en la akiroj de Esperanto.

SEMAFORISMOJ

La plej valora juvelo estas rideto. Ĝi plibeligas eĉ sendentan buŝon. Oni povas rideti ne malfermante la buŝon.

La homo estas kiel vorto prenita el vortaro. Lia senco kaj signifo varias laŭ la kunteksto.

PRISMO de la ĈIUTAGA VIVO _____

"Sparkas la Ŝvartsa metodo en la romano 'Kiel akvo de l' rivero" : Eddy Borsboom.

Schwartz finverkis la romanon en 1963 kiam li estis emerito. La preskaŭ kvincent-paĝe dika libro estis raraĵo tiutempe en Esperantujo. Ĝi amplekse aŭtobiografias kaj respegulas la vivon en lorenaj vilaĝoj dum la unua duono de la dudeka jarcento. La unua parto ampleksas la periodon ĝis la dua mondmilito. La lasta kvarono, pritraktas la jarojn 1939-60. Kvankam Parizano pro sia alta posteno en banko, li frandis kamparanan etoson kiun li trovis en Sécourt. Li sukcesis ne miksigi sian profesion gravulecon kun sia ĝuserĉa libera tempo kiam li moke rigardis la socian vivon laŭmodan.

PILGRIMADO _____

S.ino Francine Schwartz, filino de nia verkisto, ĉeestis la aranĝon. Ŝia kono de la familia historio, instigis kelkajn legemulojn fari rondvojaĝon tra la vilaĝoj priskribitaj en "Kiel akvo de l' rivero", sude de Metz, en la valo de la rivereto Seille (sej). La fikciaj nomoj de la vilaĝoj Bessancourt, Autrecourt kaj Chanzi nomiĝas Ressaincourt, Mailly kaj Sécourt sur la mapo. En Sécourt, kie troviĝas la gepatra domo, kelkaj olduloj ankoraŭ rememoras pri "Raymond". Inter tiu vilaĝo kaj Mailly, oni trapasas la iaman landlimon, nuntempe per aŭto, tie kie prusaj doganistoj deĵoris ĉe la rando de la arbaro.

Pilgrimantoj ankaŭ faris nepran viziton al la tombejo en Moncheux kie la verkisto ripozas kune kun siaj gepatroj. Li mortis en 1973.

A. Hubert

Multaj el la verkoj de Schwartz ne plu troveblas krom brokante.

Vertkata testamento (unua kabaredaĵo),
Kolekto de noveloj,
Opereto "Koro estas instrumento",
Anni kaj Montmartre (romaneto),
La stranga butikio,
La ĝoja podio,
Kiel akvo de l' rivero,
Vole Novele, ("kremo" de liaj noveloj)
Kun siaspeca spico
Artikoloj por pluraj revuoj.

SECOURT (57)





El nia libroservo

INFORMOJ

⇒ **dum somere**, la libroservo partoprenas la esperanto-budon en Fontenoy la Joŭte(1), ĉiun lastan dimanĉon de la monato (se ne pluvos). Sed ĉar la budo konsistas nur el du tabloj, kompreneble la tuta libroservo ne povos ĉeesti! Nur kelkajn librojn ni povas kunporti: la neprajn, la novajn, kaj tiujn kiujn vi eventuale mendus antaŭe je la ĉi-suba adreso (tiel vi ŝparus sendkostojn)

⇒ **La libroservo partoprenos la 52an staĝon en Villers lès-Nancy la 19an kaj 20an de oktobro**. Ĉiuj el la 460 titoloj, -novaj kaj malnovaj-, -grandaj kaj malgrandaj-, porgrandaj kaj pormalgrandaj, estos tie aĉeteblaj

⇒ **Venontfoje** estos prezentitaj kaj komentitaj kelkaj libroj konsilindaj al komencantoj kiuj deziras progresi

(1) *Fontenoy la Joute estas vilaĝo de departemento Meurthe et Moselle, je 10 km okcidente de baccarat, kie kelkdekoj da librovendejoj aŭ asocioj ekspozicias librojn, ĉefe la lastan dimanĉon de la printempaj kaj someraj monatoj.*

NOVAJ LIBROJ

- **Adoru!** -ekumena diserva libro 1472p - opo I.K.U.E. kaj K.E.L.I.. 19,00 € . Tre belaspekta ekumena Diserva libro. Jen la komentoj de la eldonisto: *ADORU estas riĉ-enhava libro kun 1472 paĝoj entenantaj multajn kristanajn kantojn (kun muziknotojn) internacie elektitajn melodiojn kaj kantojn, bibliajn tekstojn kaj preĝojn por Diservoj kaj por privata uzo, mes-tekstojn laŭ la oficiala meslibro. ADORU estas presita sur eksterordinare maldika biblia papero 33-grama, ne tro peza (540 g), ne tro dika (3cm), ne tro granda (10,5 cm x 19 cm kaj solide bindita en helruĝa tola kovrilo, aŭ altvalore kun nigra leda kovrilo kaj ora tranĉaĵo.*

- **Tarokoj kaj epokoj** - Romano - 658p - Christian Declerck - F.E.L. - 38,00 €

- **Lingva arto** - 75a jubilea libro omaĝe al William Aŭld kaj Marjorie Boulton 220 p - Benczik - U.E.A. - 16,50 €

- **Mondoj** - 216 p - Opo- KLEKS. - 16,50 € - 34 esperantaj rakontoj

- **La lada tambureto** - Romano 533 p. - Günter Grass KLEKS 36,00 €

- **Cecilja** 106 p F.E.L. 12€

- **La afero Jesuo kaj la Judoj** - prireligia libro - 158 p Tomson - F.E.L. - 11,00 €

Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 7 place de PARIS 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan medilon)

- per e-poŝto al «libroservo@wanadoo.fr»

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkosto)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Germananoj povas pagi per germana poŝta ĝiro al la poŝta konto de TAKE (POSTBANK 3393 48-758 BLZ 660 100 75), indikante: «libroservo + numero de fakturo»

Resumoj, recenzoj, opinioj...

⇒ Ĉiu leginto kiu deziras recenzi, preparoli, opinii pri legita libro povas sendi al mi (je la adreso de la libroservo) kelklinian tekston por ke ĝi aperu en tiu rubriko en venonta informilo. Jen komentoj de samideano ne deziranta konigi sian nomon

MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO (Tivadar SOROS) eldonis U.E.A. - Prezo : 24,00 €

Tivadar SOROS eble ne estas nomo, kiu elvokas ion al vi, sed se vi aŭdas pri George SOROS, viaj pensoj sin direktas al Usono kaj poste denove al orienta Europo : jes ja, George SOROS estas tiu usona milionulo, kiu helpas al ekonomia disvolvigo de la eksaj komunistaj ŝtatoj en orienta Europo. Kaj Tivadar - kies antaŭa nomo estis Theodor S. SVARC - estas la patro de George kaj ties ekonomie ankaŭ sukcesa kaj helpema frato Paul.

Jen do pri la familio de la aŭtoro de Maskerado ĉirkaŭ la morto. Antaŭ ol instigi vin al legado de tiu atentokapta libro, mi informu vin, ke pere de la ondoj de Radio Polonia (Certe ankaŭ vi ĉiuvespere aŭskultas la esperantlingvajn elsendojn) Humphrey TONKIN, kiu reldonis tiun libron jam aperintan en 1965 kun interesaj antaŭparoloj kaj notoj, petegis la esperantistojn, ne kontakti George SOROS, por peti monon de li por la movado !

Sciante ĉion tion, vi povas eklegi la rakonton de tiu esperantlingva juda advokato vivinta en Hungario, amiko de BAGHY kaj de KALOCSAY, kiu junaĝe jam konis siberiajn punlaborejojn kaj komencis juran karieron en Budapeŝto, ĝis la alveno de la naziaj botoj, kiuj pliakktivigis la lokajn samopiniantajn sagokrucanojn al pli kaj pli teruraj fiagoj. Dank' al lia inteligento kaj al multe da bonŝanco - kiel li tion konfesas mem - , Tivadar SOROS sukcesis savi sian familion kaj helpi al multaj aliaj persekutitoj. Nepe leginda libro !

JOHANO - El la vivo de roterdama knabo (K.J.K. Vroegop) eldonis Esperanto-klubo Den Helder - Prezo: 7,00 €

Ni vetu, ke neniam vi legis pri la vivo de juna matroso sur bargeo trenata sur la Rejno kaj veturanta de Rotterdamo ĝis Karlsruhe. Jam tio estus rakonto, per kiu vi alkutimiĝus al multego da ĉi-ternaj fakvortoj en Esperanto. Se ni aldonas, ke ĉio tio okazis dum la Dua Mondmilito post invado de Nederlando fare de la germana nazia armeo kaj ke la ŝipado estis endanĝerigita pro la oftaj aeratakoj de la angloj, vi legos tiun vivrakonton kun ankoraŭ pli granda scivolo. Des pli, ke la aŭtoro de la libreto estis la kreinto de la Esperanto-klubo Den Helder kaj ties longjara prezidanto.

DIS ! (Sten Johansson) Eldonis FEL Prezo : 12,00 €

Nu! La kovrila bildo de la libro nekutimas en Esperantio ! Ja ekzistas kelkaj erotikajoj, do ankaŭ sur tiu kampo de la vivo ia esperantistoj ekzistas !!! Sed ŝajne, kion en kelkaj lingvoj oni nomas per la sama vorto (ami - amori) ja ankaŭ konfuzas tiu svedo - cetere almenaŭ pasiva esperantisto ! Ree nu ! La rezulto estas ĝuste sinsekvo da "disoj", kiujn vi povas kunvivi sekvante la itineron de tiu serĉanto !

Kelkaj vortoj pri la vortaroj kaj leksikoj

1) du lingvaj

- **dictionnaire de poche (poŝvortaro) SAT-amikaro** - 132 p - 1996 - **4,30 €**. Ĝi donas la tradukon de la ĉefaj radikoj de Esp.-france-kaj reciproke kaj enhavas 20 paĝojn pri la bazaj reguloj de gramatiko kaj konjugado kaj la plej uzataj simplaj frazoj. Taŭga por komencantoj

- **lexique fondamental Esperanto-Français** de Roger Léger collection *Nova* - 114 p -1957 - **3,10 €** Malnova eldonaĵo, kiu tamen prezentas la tradukon de la ĉefaj radikoj de esperanto, je tre favora prezo!. Taŭga por komencantoj

- **dictionnaire pratique français-esperanto / esperanto-français SAT-amikaro** - 532 p - 2000 - **23,00 €** Tiu belaspekta kaj preskaŭ kompleta vortaro tradukas 20 000 francajn vortojn al esperanto kaj reciproke. La formato faciligas la uzadon kaj la transporton!

- **grand dictionnaire français espéranto U.F.E.** 948 p - 1992 - **39,70 €** - Tiu prestiĝa eldonaĵo proponas tradukon de 32 000 vortoj aŭ esprimoj de la franca al esperanto.

2) tute en esperanto

- **baza esperantista radikaro U.E.A.** 162 p - 2001 - **7,50 €** la novnaskito permesas al komencantoj lerni la bazajn vortojn dank'al esperantlingvaj difinoj, kio estas tre bona maniero ekzerciĝi al rekte esperantlingva pensado. Taŭga por komencantoj

- **plena vortaro de esperanto kun suplemento S.A.T.** 578 p (2 eldonoj)- 1971 - **10,00 €** 1996 - **23,00 €**. Reeldonoj de la unua vere plena vortaro tute en esperanto. Precizaj tradukoj de preskaŭ ĉiuj esperantaj vortoj (ankaŭ teknikaj)

- **plena ilustrita vortaro de esperanto kun suplemento S.A.T.** - 1356 p - 1987 - **64,00 €**. Prestiĝa verko konsiderata en la tuta esperanto mondo kiel la kvazaŭ oficiala vortaro, tradukas ĉiuj vortojn, kaj enhavas kelkajn ilustritajn paĝojn por la fakaj vortoj

✂.....

MENILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

-
-
-
-
-


S-ro/ino

-
-
-
-

En

la

Subskribo:



KALEJDO SKOPD

... kiel kontribuo al ...

"mi redaktas memuaron" (artikolo verkita de Claudy Demongeot *La Informilo* 117)

Antaŭ du jaroj "oni" reklamis en mia vilaĝo por partopreni en staĝo por *laborigi nian cerbon*, ĉefe kompreneble por tiuj enloĝantoj -iom pli aĝaj- ...

Kunvenis kelkaj, inter kiuj Roberto, ĉar mi interesiĝis pri la maniero laborigi *la neŭronojn*. Temas ankaŭ pri la ebleco detekti la malbonstaton de la gemaljunuloj, t.e. la malsano de Alzheimer. Ne ĉagreniĝu, mi bonfartas tiurilate, sed tamen mi serioze ĉeestis la dudekon da renkontiĝoj, por lerni kiel *gimnastigi nian cerbon*!. Finfine, *cerbumante* (bona aplikado de tiu staĝo), mi opiniis, ke interesado al lingvo konkrete ellaborita, logike konstruita kaj pro ĝia simpla frazelfarado, tio povus helpi al la *laborigado de la neŭronoj de la cerbo* de la iom pli aĝaj personoj, ne speciale por eklerni lingvon (eĉ kial ne?), sed iom simple kaj logike konstrui *ion*, kvazaŭ tio estus ludo!

La faka kuracistino, kiu komentis la staĝon "streĉ-lip-mienis", pensante ke Roberto estas ekster-mondulo... Claudy Demongeot tamen certigis, ke tiu instruado valoras en iaj medioj.

Mi do daŭrigas la laborigadon de mia menso per teatraĵo en la alzaca, deklamado en Esperanto, korespondado, varbado, informado, instruado...

Robert Kueny



La Nova "**Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto**" (PIV), formato: 150x255 mm, 1265 paĝoj, referenca vortaro de Esperanto en la tuta mondo, kies unua eldono aperis en 1971, estas finfine presita kaj liverita.

Temas pri funde reviziita kaj aktualigita eldono, kies ilustraĵoj estas lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpiigitaj en la teksto mem. La inaŭguro de la verko okazos kun ĉeesto de ĝia ĉefredaktoro, *Michel Duc-Goninaz*, dum la SAT-kongreso kiu havos lokon de la 1-a ĝis la 7-a de julio en Alikanto (Hispanio).

Prezo, 70 euroj + registrita afranko. Pro la kongreso kaj libertempoj, la plenumo de la mendoj kaj antaŭmendoj povos okazi nur post la libertempoj. Pliaj informoj estas riceveblaj de :

SAT, 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio.
satesper@noos.fr <http://www.sat-esperanto.org/>

Samtempe aperis alia bonaspekta 158-paĝa (135x195 mm) SAT-eldonaĵo:

"**La Universalismo -- Historio, ekonomio kaj filozofio**", de Djémil Kessous.

Temas pri traduko de lia libro originale verkita franclingve sub la titolo "*Universalisme*", kiun eldonis Acratie, Parizo, en 1997. La traduko estas de Jacqueline Lepeix. Funkciulo ĉe la franca Ŝtata Konsilio, Djémil Kessous eklernis Esperanton tuj post apero de la originalo de tiu libro. Li eĉ komencis ĝin instrui. Li jam antaŭe aperigis "*La théorie générale de l'évolution*" (La ĝenerala teorio pri la evoluado) ĉe la eldonejo L'Harmattan, Parizo, en 1994. Prezo: 12 euroj + afranko.



granda honorigo

La lastaj dudek jaroj de la pasinta jarcento estas tre signifaj por nia Esperanto-movado. En la 15a de septembro 1980 s-ro **Hans Bakker** skribis la unuan leteron al Afriko kaj tiel komenciĝis la Afrika Agado.

Dank' al la granda kaj nobla laboro de s-ro Bakker, nia movado estas enkondukita en la kvina kontinento -- Afriko. Tiel ĝi fariĝis tutmonda.

Pro la granda kaj nobla laboro, s-ro Bakker ĵus ricevis altan honorigon en **Nederlando**, donitan de la reĝino: "*Kavaliro de la Reĝino*".

(senatano Nelly Holevitch)



Une excellente émission sur l'espéranto a été diffusée sur Radio Suisse Romande

le vendredi 21 juin 2002 de 9h30 à 11h

"L'espéranto, un espoir déçu ?" <http://www.rsr.ch/view.asp?DomID=14> L'émission peut être écoutée en Real Audio sur le site durant un mois.

Avec des interventions de Claude Piron (plus excellent que jamais), François Randin producteur de films en espéranto, (excellent!!) et d'autres espérantophones suisses qui ont apporté des témoignages tous très positifs. . . les interventions des auditeurs étaient également toutes positives. . . un vrai rêve. . .

L'émission a duré une heure et demie et je n'ai jamais entendu une aussi bonne émission sur l'espéranto! On y entend l'espéranto de façon vivante, amusante et avec une incitation à la curiosité formidable!

Nepre aŭskultu kaj aŭskultigu!!

A écouter et faire écouter absolument!

Il est aussi possible d'acheter la cassette de l'émission en la commandant à l'adresse:

<fessler.communication@com.mcnet.ch en indiquant:

- le nom de la chaîne: RSR - le titre de l'émission: *Mordicus* - le thème ou le nom des personnes invitées: "L'espéranto, un espoir déçu?" avec Claude Piron pour son livre "Le défi des langues" - la date: 21/06/2002 - l'heure: 9h30 à 11h00 - le nombre de K7 désiré.

- l'adresse postale où effectuer l'envoi.

Prix: pour une cassette + port et emballage: 30 -

(Je suppose qu'il s'agit de francs suisses, demandez plus de précision pour d'autres pays. . .)

Autres coordonnées du Service cassettes:

tél. : 026/323 24 24 fax: 026/322 72 54 Service K7 RSR, case postale 319, 1701 Fribourg

<http://www.rsr.ch/>

Je conseille très vivement à toutes les associations d'acheter cette cassette qui, pour un prix modique, constitue un instrument de promotion d'une qualité sans égale à ma connaissance. Dépêchez-vous car elle n'est disponible que pendant un mois après la diffusion!

Zav' (Xavier Godivier)



... j'informe, tu informes, elle/il informe, nous informons, vous informez, elles/ils informent !... ☆

ESPERANTO-FRANCE *** met à la disposition de tous les groupes des lots de matériel d'information, à savoir lots d'exemplaires du n° 531 « **LE MONDE DE L'ESPERANTO** », auxquels sont joints à chaque fois 50 dépliant « **Le monde au bout de la langue** » et des prospectus divers, dans la limite des tranches de tarifs/poids de La Poste.

Pour **20** revues, **50** dépliant et un complément divers, frais réduits à prévoir : **5 €** - Pour **40** ... **8 €**

Les prix comportent une partie du P.R., des frais de préparation et d'envoi et une participation incluse par groupe de 1 €

Pour commander, préciser le nom du groupe, de son responsable, et le nombre d'actifs. Ne pas payer d'avance.

*** 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS



CARRY LE ROUET - 2001



*Les Anciennes et leurs maris
Pour compléter leur almanaque
Sont venus au pied de l'Estaque
Mouïller aux plages de CARRY*

*Maïs s'ajouta de l'inédit :
Ce cours savant où l'on apprît
Les ors cachés de la garrigue,*

*Et, cerise sur le gâteau,
Outre les cassettes, les gîgues,
Les vertus de l'espéranto.*

... du bulletin n°97 = 2002
de l'amicale des anciens élèves
des Ecoles Normales
d'Epinal et de Mirecourt (88)
(443 abonnés)

*Croisière aux délicieux roulis,
Soleïl jouant avec les flaques,
Artes ou trésors massiliaques
Ont jalonné leur paradis.*

Jehan de Néocastrie

« ... le mot espéranto est paru 11 fois
dans ledit bulletin... »
(info Ginette MARTIN)



" Expolingua 2002 ": ne atendita ĉeesto !..

Kiel sciante la planoj de HEF (Hispana Esperanto-Federacio) rilate al sia partopreno en la lingvofoiro "Expolingua" limiĝis post profunda analizo al ĉiu dua jaro, ĉefe pro manko de financaj rimedoj. La provo atingi subvenciojn de oficialaj instancoj absolute vanis dum tri jaroj, kaj la subvencioj ricevitaj de E-fondaĵoj, eĉ se tre bonvenaj kaj dankendaj, estas tamen ne sufiĉaj por ke la la asocio povu senprobleme plenumi aliajn elspezojn ankaŭ bezonatajn por la disvolviĝo de ĝia ĝenerala aktivado.

Tiel statis la afero, kiam la 1an de aprilo surprize telefonis al HEF la organizanto de *Expolingua* ofertanta senpagan budon de 6 m2, inkluzive meblaron kaj elektron. Demandinte kial senpage, ni ricevis la respondon, ke ili tiom amas nin. Facile tamen supozeblas ke ne vendiĝis ĉiuj spacoj, kaj Esperanto iel buntigas la foiron.

Nu, ĉu akcepti au rifuzi? Ĉar la foiro estis okazonta inter la 11a kaj la 14a de aprilo, jen unuflanke malpli ol dek tagoj por organizi la tuton. Sed aliflanke ne decus diri ne al tiaspeca ne petita "subvencio", konsiderante ke tiom malmulte ni atingas el la ekstera mondo kaj ke ia muntaĵo, eĉ se povra, bonus pli ol nenia ĉeesto.

Konsultinte la estraron retpoŝte, kaj post kompreneble jesa respondo, la kutima skipo komencis la laboron.

La sperto de pasintaj fojoj multe faciligis la ĉiĵaran aranĝon kaj, sen grandega laboro, ni disponis jam plurajn informilojn kaj materialon diversan por montri kaj vendi.

Nia budo konsistis el sesono de dividita sesangula standego, kio signifas, ke la spaco disponebla estas triangulo dumura, kies tria flanko permesas la aliron de la publiko. La kompletan standon oni nomis dumfoire "*El kiosko de las lenguas*" (la lingvo-kiosko).

La budo havis tribretan bretaron kaj montrotablon, do, ne grandan spacon por ekspozicii, kio devigis nin elekti inter la videilo (por montri la vidbendon *Mazi*), kaj la komputilo (por montri la *HEFpaĝaron*). Ĝia pli malgranda volumeno favoris la unuan.

Kiel novaĵo ni prezentis haste pretigitan flugfolion pri ĉiaspecaj esperantaj TTT-ejoj, surbaze de simila informilo "*Esperanto-Panoramo*", aranĝita de la franca esperanto-junularo kaj kies originala formo troviĝas en www.esperanto-panoramo.net.

Ne eblis organizi loton surbaze de la ludotesto, sed per minimuma manipulado tiu flugfolio aliĝis en plian informilon.

Denove Esperanto vekis intereson, surprizon, kaj eĉ rifuzon --kial ne diri-- inter la publiko; sed estas ja pozitiva atingo, ke serioza entrepreno kia "*Fundaci'n Actilibre*", kies tasko estas organizi seriozan eventon movantan tiom da mono kaj da homoj, konsideras Esperanton inda je ĉeesto tiukadre.

Ana Manero.

inf: Miguel Gutiérrez Adúriz liven@wanadoo.es



" RONDO FAMILIA " - KIO ĜI ESTAS, KAJ KIEL VI POVAS SUBTENI ĜIN.

☆☆☆☆☆☆

En la vasta pejzaĝo de mallongigoj kaj de asocioj apud UEA kaj TEJO ekzistas ankaŭ "*Rondo Familia*".

Ĝi celas kovri tiun aĝ-grupon, kiu entenas ĵus geedziĝintajn parojn kaj iliajn infanojn, ĝis la momento, kiam la infanoj kapablos mem veturi al TEJO-aranĝoj.

Ĝi registras familiojn, kiuj uzas Esperanton hejme kaj edukas siajn infanojn en Esperanto. Ĝi zorgas pri aranĝado kaj informado pri pluraj kunvenoj por infanoj (kiel la Internacia Infana Kongreseto aŭ la Renkontiĝoj por Esperantlingvaj Familioj).

Ĝi eldonas tre belan revueton, kies titolo estas "*Familia Esperanto*". Ĝi tenas la kunligojn kun la ret-listo por familioj kaj kun la ret-paĝoj por familioj kaj infanoj. De tempo al tempo ĝi eldonas aĵojn utilajn. La plej furora eldono estis "Hejma vortaro".

Ĉu, do, ĉio en ordo? Preskaŭ!..

Mankas du ĉefaj aferoj, pri kiuj nur vi povas helpi, kaj neniu alia:

= sufiĉe da aliĝantoj. Ĝis nun nur 300 familioj estas registritaj kiel tiaj en la komputilo de la CO de UEA. Se vi estas en familio, kiu uzas Esperanton, aŭ se vi konas tian familion, sendu la detalojn pri la familianoj al uea.co.uea.org por esti senpage registrata.

= sufiĉe da mono. La servoj de Rondo Familia estas principe senpagaj, sed bonhavaj familioj kaj mecenatoj devas pagi la kostojn de la revuo "*Familia Esperanto*" kaj aliajn malgrandajn administraj kostojn. La konto de "*Rondo Familia*" ĉe UEA estas "idoj-p".

Se vi volas korespondi pri ĝi kaj demandi pliajn informojn, bonvolu skribi al la kunordiganto de la komitata komisiono pri Rondo Familia: "Amri Wandel" amri@frodo.fiz.huji.ac.il



Al miaj amikoj kaj korespondantoj, kiuj uzas la komputilon por Esperanto

Ĉu vi konas la vindozan programon *Windows Commander*? Mi uzas ĝin preskaŭ ĉiutage. Temas pri "Shareware" - programo por prilabori dosierojn - tio estas por legi, redakti, kopii, nuligi, transsendi, partigi, arkivi, ktp; datojn. Ĝi komplete anstataŭas *Windows Explorer* kaj estas multe pli vaste kaj praktike aplikebla.

Ĉiuj programtekstoj – menuoj, tabelkapoj, mesaĝoj, klarigoj – estas ŝalteblaj inter multaj lingvoj, inter ili ankaŭ ESPERANTO. La tradukon al Esperanto faris mi;

La plej novan version 5.0 de la programo vi povas senkoste elŭti de www.ghisler.com; Ĝi entenas la standardlingvojn (germana, angla, franca, hispana, ktp.). Esperanton vi devas aparte elŭti de la sama ttt-paĝo, rubriko "Zubehoer" aŭ "Add-ons". Nur zorgu, ke post la elŭto, ĉio troviĝas en la sama dosiero, ekz. c:\Ĵincommand. La ŝanĝo inter la instalitaj lingvoj okazas en la menuo "Konfiguro", submenuo "Lingvoj". Se vi registras, la aŭtoro ŝanĝas unufojon kotizon de 28 €. Li liveros manlibron, iomete faciligitan prograstarton kaj senkoston ĝisdatigon.

Ĉu ĉio funkcias? Se vi iel fiaskas, bonvolu turni vin al mi. Se vi deziras, mi ankaŭ informos vin pri la fakvortaro uzita por la traduko.

Mi ĝojos, se plaĉos al vi la programo kiel ekzemplo pri la utileco de Esperanto. Bonvolu raporti al mi viajn spertojn!

Salutas, Klaus SCHLÜTER, kschlue@aol.com el LAATZEN (D)



Miliono da vizitoj !!!

Kun granda ĝojo mi informas, ke la 15-an de majo niaj paĝoj www.esperanto.pl estis vizititaj jam **milio**n fojon. Tio estas impona rekordo. Tiun rekordon ni atingis dum pli ol 13 monatoj. Centmilian viziton ni havis en julio pasintjare, kaj kvincentmilian en decembro 2001. Ni kontrolis, ke vizitoj estis el diversaj partoj de la mondo. Krom la diversaj ekzotikaj kaj foraj landoj estis eĉ registrita vizito el Paska Insulo !

Mi aldonas ke krom tiuj paĝoj ni havas informriĉan (pole kaj esperante) duan lokon

www.esperanto.w.pl

Krome antaŭ kelkaj semajnoj juna komencanta lernanto preparis interesajn informojn pollingve sur siaj paĝoj www.esperanto.zanet.pl

Mi rememorigas, ke estas kelkaj polaj urboj kiuj havas siajn paĝojn ankaŭ en Esperanta versio:

www.malbork.pl/ pri la urbo Malbork (plej granda brika teŭtona kastelo en Europo)

www.um.bialystok.pl/ pri la naskiĝurbo de Zamenhof

www.um.gliwice.pl/ pri Supra-Silezia urbo kun riĉa historio

www.przemet.pl/ pri la urbo kaj komunumo Przemet (okcidenta Pollando)

www.um.torun.pl/esperante/ pri la urbo de Nikolao Kopernik Mi petas viziti tiujn paĝojn kaj enskribi en gastlibrojn por konvinkigi la urbgvidantojn, kiuj ofte administras tiujn paĝojn, ke Esperanto estas funkciata lingvo, servanta ne nur kiel hobbio.

inf: *Stanislaw Mandrak* - prezidanto de PEA <staman@ka.onet.pl>

-----Tiu ĉi mesaĝo estas distribuata laŭ la dissendolisto: 'interredaktore' - Ekzistas alia, multe pli kompleksa retpoŝta novaĵservo RET-INFO, kiu staras ankaŭ je via dispono: Vidu: <http://www.eventoj.hu/ret-info.htm> -----



... ne sufiĉas aserti, ke esperanto vivas sur la tuta tergloblo !... Ni pruvu ĝin !...

"La Verda Stelo-Esperanto 94" (Francio) ŝatus ricevi bildkartojn el la tuta mondo, okaze de la *Festo de la Asocioj de la urbo*, kiu okazos la 21an de septembro 2002. La temo estas "CHOISY-le-ROI, meze de la mondo"

Abundu la sendaĵoj!... Estiĝos ja konkurso inter la diversaj urbo-asocioj... Jen okazo montri la konkretan vivon de Esperanto!

Adreso: *La Verda Stelo-Esperanto 94*, 3/507 rue Pablo Picasso, 94600 F-CHOISY-le-ROI

Anticipan dankon al ĉiuj kontribuantoj!

Sylviane LAFARGUE

Sylviane.LAFARGUE@sncf.fr

Noto de la redaktanto de „La Informilo“: Se ĉiu el niaj legantoj kontaktus unu solan amik(in)on ekster la francaj landlimoj, konigante tiun „alvokon“, ni certas, ke „lavango“ da bildkartoj atingus la ĉi supran adreson!



== INFANOJ SAVAS ŜAFEJON !... ==

Unue, mi precizigas ke Sro JOANNIER, ĵurnalisto, kiu redaktis la artikolojn, el kiuj mi ĉerpis la materialon de la jena verkaĵo, permesis al mi uzi ilin. Dankon al li.

Mi legis en la ĵurnalo VAR-MATIN, en februaro 2000, artikolon, kies titolo estis: "la lastaj tagoj de la ŝafejo". Kaj, kelkajn tagojn poste, mi legis la sekvon, kies titolo estis: "Infanoj savas la ŝafejon". La du artikoloj tiel aspektas priskribindaj de Alphonse Daudet kaj de Giono, ke mi emis traduki ilin esperanten.

Jen la eventoj...

Ekde 1979, S-ino J.G. estas kapristino. Ŝi laboras kaj loĝas en provenca kamparo proksime de urbo "Le lavandou". Sciu, ke en nia regiono, multe diferencas, en la sama komunumo, la marbordo kaj la enkampara teritorio for de la maro. Apud la maro: pli malpli luksaj konstruaĵoj, precipe someraj, multe da turistoj allogitaj de la varmaj vesperoj kaj de la festa etoso kiu regas en la banstacioj, multe da bruo... Sed male, kiam oni forlasas tiun malkvietan urban parton, oni trovas post dekvinkelko da kilometroj paradizan anguleton. Imagu: grundo, kie kreskas pinoj, pinastroj, timiano, cisto, rosmareno... Grundo, kie estas aŭdeblaj la cikada ĉirpado, la birdaj kantoj, la beo de la kaprinoj... Spiru, flaru! Kio bonodoras? - la "provenca parfumo"-, kiu konsistas el odoro de pinoj varmigataj de suno, odoro mikсата de timiana parfumo... Do, en tiu "benita de dioj" teritorio, S-ino J.G. kiu pasie ŝatas bredi la kaprinojn, konstruis unuetaĝan domon. En ĝi loĝas kun ŝi ŝia filo, ŝia edzo kaj en aparta loko, kvardeko da kaprinoj. Ve!... La domo estis konstruita sen leĝa permeso, sur bieno situanta en "protektita nekonstruebla tereno" kaj, plie, arbokovrita!... Nek la urbestro, nek amikoj, kiuj baraktis por solvi la problemon ne sukcesis havigi al la ŝafistino la deziratan konstru-permeson. La paŝistino estis kondamnita al alta monpuno kaj detruo de la ŝafejo. Notu, ke la 30an de januaro 1998, S-ino G estis nomumita "kavaliero pro merita ago en la agrikultura fako". Kaj plie, notu ke, de longat empo, la lernantoj de Bormes kaj de "la Lavandou" vizitas la ŝafejon, gviditaj de la instruistoj.

Por pagi la monpunon (-85 000 F)- S-ino G, senesperigite, rezignaciis vendi la tutan kaprinaron. Imagu la ĉagrenon, kiu invadis la koron de la kompatinda paŝistino... Sed, feliĉe, dank'al la regiona gazetaro, la informo disvastiĝis, kortuŝante multe da legantoj, naskante ĉe la loĝantoj egan solidarecan impeton. Sed, laŭ mi, la plej interesa ago estas la partopreno de la infanoj. Juĝu mem...

Jen la letero skribita de infano al Sro urbestro de "le Lavandou" (resumo)

Mi ne intencas skribi longan leteron al vi. Mi estas nur ploranta infano pro la ĉagreno. Ne plu vidante niajn pliamatajn kaprinojn ĝojsaltante sur la vojo al la lernejo, Miaj samklasanoj kaj mi lamentas pro ilia malapero. Ne kredu ke mi skribas tion por kormoligi vin: ni ĉiuj vere, sincere ploras. La redakcio de tiu letero kaŭzas al mi almenaŭ duonhoron da zorgoj...(tiel)...

Kortuŝa letero, ĉu?... kiun kunsuskribis multe da gelernantoj. Ĝi certe ege influis la decidon de la urbestro. Fakte, la konstru-permeso estis donita la 31an de januaro. La ŝafejo estis savita. Malgraŭ ŝia 73 jar-aĝo, S-ino J.G. retrovis novan junecon! Ŝi aĉetis dudek kaprinojn, kaj, laŭleĝe, ŝi ekrenovigis la ŝafejon. Ŝi povos kviete dormi!

Jen la respondo farita de la Ĉefurbestro, S-ro Bernardi al la juna lernanto: (resume)

"Sciu ke, de kvin jaroj, mi baraktas por normaligi la situacion de la ŝafistino. Hodiaŭ, mi povas kvietigi viajn maltrankvilojn kaj vian malĝojon. Mi do povis modeste partopreni daŭrigon de tiu provenca bredado, kaj ankaŭ ĝojigi viajn samlernantojn, kies guston por tradiciaj valoroj mi ŝatas same kiel vi. Mi dankas al vi pro via bela letero, kiu kuraĝigas min daŭrigi mian laboron. Mi estas feliĉa kalkulante je la juna generacio por konservi la vilaĝajn tradiciojn.

Kion oni povas dedukti de tio? Kiam plenkreskaj homoj ne sukcesas humane solvi tiklan problemon, infanoj povas instigi la aŭtoritatojn, por ke ili trovi feliĉan kaj humanan solvon. Sufiĉas, ke estu aplikata la diro de Mŝo Liautey: "administrati ne estas malpermesi je nomo de la leĝo, sed permesi je nomo de la saĝo"

Kaj, plie, ni estu fieraj ke, en Provenco, estas infanoj kiuj meritas la nomon: "civitanaĵ infanoj".



redaktita de F5NAQ
THOMAS Gilbert
Draguignan

Esperanto en Saint-Amarin

La 9an de junio okazis en la preĝejo de Saint-Amarin (en la valo de Thann) grava religia ceremonio. La preĝejo estis plenplena. La episkopo de Strasburgo Monsinjoro Doré celebris la ordinadon de 4 junaj viroj. Michel, Thomas, Gabriel, Christophe estis ordinataj diakonoj. Gabriel Anda estas esperantisto el Kamerunio kaj en la lastaj jaroj studento en Strasburgo. Per tiu ceremonio li fariĝis diakono por poste iĝi pastro, kio verŝajne okazos antaŭ unu jaro. Li estas el la diocezo Edéa el Kamerunio.

Gabriel estas bone konata de pluraj esperantistoj el la regiono kaj el Germanio. Iam li estis gasto de Odette Scheidel el Betschdorf, ankaŭ germanaj samideanoj gastigis lin. Tial al tiu ceremonio venis pluraj esperantistoj el Betschdorf, el Villigen-Schwenningen en Germanio, pastro Andreo Héroux el Allex (departemento 26), iama misiisto en Kamerunio, por renkonti kaj subteni Gabriel Anda en tiu tago de lia diakoniĝo.


Post la ceremonio en la preĝejo, la ĉeestantoj (pli ol 500 personoj) estis invititaj akcepti honorvinon kaj diversajn kukojn en fest-salono de la vilaĝo. Tiam estis okazo por la samideanoj renkontiĝi kaj kune babili. Fine venis ankaŭ Gabriel, kiun ni varme gratulis pro tiu grava decido en lia vivo. Tre verŝajne ni ĉiuj iom fieris, ke inter la 4 novaj diakonoj estas esperantisto, simpatia juna viro el Afriko, nia amiko.

Gabriel Anda, 36-jara, originas el Kamerunio, kie li studis. Poste li venis al Francio por studi teologion en Champagne sur Rhône. Antaŭ 2 jaroj li eniris la Seminarion de Strasburgo por plua studado. Ĉi-jare li eniris la paroĥejon de Schiltigheim apud Strasburgo. Monsinjoro Tonyé Bakot, episkopo de Edéa en Kamerunio prezentis lin por la ordinado.

Odette Scheidel el Betschdorf jam gastigis lin en sia hejmo. Jen foto de la junulara grupo okaze de la regiona kongreso en Strasburgo en 2001.

Odette estas konata, kiel avinjo Esperanto. Jen ŝi estas ĉi-tie en la centro inter gejunulo kaj apud Gabriel Anda.

André Grossmann



Eble vi scias, ke mi instruas Esperanton perkoresponde al dudeko da gejunuloj el Senegalio, kaj al... du pli aĝaj famili-estroj, kiuj perfekte preskaŭ finlernis la *Metodo-n 12* .. Unu el ili, ĝendarmo, eĉ deziras krei Esperanto-Centron, tridek kilometrojn de Dakaro !

Ĉi-monate venis al mi tasko de lernanto, kies nomo estas *YOUM*, kaj persona nomo *Papa* (sed skribita per *majuskla Po!*); Li preskaŭ finas la studadon de Esperanto... sed jam malfermis sian koron por esprimi sin en Esperanto. Jen ĉi-kune liaj tri poemoj, kiujn li sendis al mi. Mi tiom ĝojis, ke mi proponis aperigi ilin en *La Informilo* por gratuli lin!

Saluton, Papa!... Mi antaŭ-planas viziti ilin en Dakaro, venontjare.. Iam, la ritmo de Esperanto de Afriko, kiel la ritmo de la muziko kaj danco

Roberto KUENY

Mi volas esti...

Mi volas esti eta rideto
 Por povi gliti en vian liton
 Kaj murmuri al vi iajn afablajn vortojn
 Mi volas esti ĝardenisto
 Por povi semi en via koro
 Florojn plenaj je ĝojo
 Mi volas esti sago
 Por trapiki vian koron
 Kaj vivi kune kun vi plej ĝojajn momentojn

Krio de koro ...

Mi estas senespera
 Mi estas maltrankvila

 Mi estas vundita.
 Kio estas tiu vivo?
 Kio estas tiu sovaĝa vivo ?
 Kiu igas la homojn vivi ?
 Kial la homoj estas tiom kruelaj ?
 Kial la homoj estas tiom aĉaj ?
 Kial tiom da sufero ?
 Ĉu pro la scienco ?
 Aŭ pro fi-uzado de la scienco ?
 Do, se tio estas la vivo,
 Mi demandas min,
 Ĉu necesas naskiĝi kaj ekzisti,
 Nur por suferi.

Papa *YOUM*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

Paco ...

Eta kvar-litera vorto
 Sen vi la mondo estas ĉiam teda
 Sen vi la vivo de la homoj sur tero
 estas malfacila
 Sen vi la feliĉo ne povas ekesti
 en la koroj
 Sen vi la amo ne povas ekzisti
 Kiam vi venos?
 Via foresto alportas la morton
 En mia ekzisto
 En mia koro
 En mia lando
 En mia estimata Afriko
 En mia mondo
 Kiam vi venos ?
 Vi, kiu donas la vivon en koro
 Vi, kiu ĝuigas la vivon
 Vi, kiu aldonas la plezuron
 al la ekzisto
 Kiam vi venos ?
 Vi diris al ni, necesas
 por ke vi venu,
 Ke senkulpeco loĝu en la homoj
 Ke amo loĝu en la homoj
 Tial, ni alportas nian ŝtonon
 Por la konstruado de tiu palaco,
 kie ĉiuj homoj loĝu
 Tiu ŝtono estas la verda ŝtono
 ... Esperanto ...
 Kiu, vidata de ĉiuj, vokos
 la blankan birdon
 Kiu ja estas nenio alia ol vi "Paco"

Ĉiujn entuziasmulojn, kiuj okupiĝadis pri la figuro de doktoro Faust, estus tre malfacile rememorigi, des malpli elnomi-destini. Eble la plej konata estas la verkaĵo de Johann Wolfgang Goethe. Al Faust li imputadis multajn miraklojn, kiujn al li helpadis realigi la satano, kiu lin ĉiam akompanis en alegorio de hundo nigra. Multaj homoj ĝis hodiaŭ estas konvinkitaj pri tio, ke Faust estis nur nurnura literatura figuro, ke Faust ververe ne ekzistis. Versimile li pereis en sia laborejo post eksplodo en jaro 1540. En unu el siaj leteroj al ni doktoro Faust postlasis priskribon de kosma vojaĝado. Multaj homoj konsideris Fauston mensogulo aŭ trompisto, male la aliaj kredis, ke li estas granda mago. Li mem konsideris sin kiel granda alkimisto kaj ja proklamadis, ke tiomajn miraklojn, kiujn faris Kristo, scias realigi eĉ li-mem.

Faust versimile naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 1480 en unu el malgrandaj urbetoj germanaj kaj pereis per indikita maniero. La legendoj jam dum lia vivo komencis aperadi. Oni al li imputadis multajn miraklojn faritajn kun helpo de la Satano. La nobelaro al li pagis multe por horoskopoj kaj por manifestacioj de liaj magiaj kapablecoj. Ekzemple li scipovis alvokadi la mortintojn, materialigi aĵojn k.s. Sed la scienculoj esprimadis sin pri li tre malestime, eĉ se malantaŭ tiu malestimo ne unufoje kaŝiĝadis la envio. Ekzistas ja aŭtopsioj, ke doktoro Faust scipovis antaŭsenti la estontecon, versimile laŭ horoskopoj. Li fariĝis modelo ne nur de tragedio, sed ankaŭ modelo de granda amaso de anekdotoj, komediaĵoj aŭ de germanaj marionetaj teatraĵoj.



Oni rakontis, kiam li eksopiris trinki bonan vinon, la spirito ĝin al li alportis senpere el la keloj. Tiamaniere la fantomoj laŭdire ruinigis la kelojn de bavaria princo kaj de salburga episkopo.... Ankaŭ la manĝaĵon de la fantomo al li alportadis el ĉiuj ĉirkaŭaĵoj lok-sidejoj, sekve de tio lia tablo estis ĉiam regnestre preparita (prezentata). Faust kaj lia servistaro ĉiam estis belege vestitaj. Al la magio li laŭdire rifuĝadis eĉ en tiaj kazoj, kiam li devis ion pagi el propra poŝo. La Jesuito Martin Delrio skribis fine de la 16a jarcento pri tio, kiam la magoj Faust kaj Agrippa vojaĝis tra la lando, ili pagis per moneroj, kiuj post kelkaj tagoj ŝanĝiĝis en bovinajn kornojn kaj similan forĵetaĵon. Sed per kio doktoro Faust sukcesis ŝoki la homojn ververe?



Ekzistas la dokumentoj, laŭ kiuj doktoro Faust scipovis elvoki la fantomon (spiriton homan), kiu jam mortis. Je speciala peto de la imperiestro Karolo la V-a, li elvokis la spiriton de Alexander Makedona kaj aliajn. Sed en Francio li ne sukcesadis. Al tiea reĝo li promesis liberigi la filojn el hispana karcero kaj "elĉarmis" ankoraŭ la militaron. Sed nek tio, nek alia sukcesis. La reĝo devis la princojn liberigi per granda monsumo. En Italio tiu ĉi granda mago organizis prezentadon de flugado sen flugiloj, sed eĉ tio ne sukcesis kaj li rompis sian gambon.

Kosma vojaĝado

En la libro de historio de doktoro Faust ni trovas unu nekutime interesan fragmenton, kiu tre diferenciĝas de la multaj tradiciaj kaj ridindigaj priskriboj. Temas pri ununura fragmento de la libro, kiu estas skribita en unua persono kaj kiel certigas la aŭtoroj de la kolekto, ĝi estas aŭtentika eldiraĵo de la heroo. Faust en ĝi eldiras: "Foje en la nokto mi ne povis endormiĝi. Mi cerbumadis pri miaj kalendaroj kaj antaŭdiroj, pri tio, kiamaniere estas aranĝita la ĉiela firmamento kaj ĉu tion kapablus priesplori la simpla homo. Subite ekblovis forta vento, ĉiuj

fenestroj en mia ĉambro malfermiĝis kaj min trapenetris granda timo. Mi ekaŭdis fulmotondran voĉon al mi diranta: "ke via dezire plenumiĝu, vi vidos, pri kio vi sopiras". La sama voĉo poste al Faust ordonis, ke li elrigardu la fenestron. La ŝokita mago ekvidis flugantan jungaĉon kun du drakoj. Iliaj flugiloj havis nigrajn, brunajn kaj blankajn makulojn, la nukon kaj kapon verdetajn kun flavaj kaj blankaj makuloj. La fluganta jungaĉo terure murmuregis. La radoj tiom klakis, tiom laŭte, kvazaŭ la veturilo turniĝus sur la tero kaj elsub la radoj eksplodadis flamoj.

Ĝis ĉi-tie ni povas la tutan priskribon konsideri kiel frukton de senbrida fantaziaĉo, sed ĝi daŭriĝas tute surprizige. Doktoro Faust ja kiel unu el la unuaj loĝantoj de la planedo certigis, ke la ĉielo en granda alteco ne estas blua sed nigra. "ju pli alten mi flugas, des pli malhele estas ĉirkaŭ mi. Al mi ŝajnas, ke el hela suno mi sinkas en abismon." Tiu-ĉi-loke estas notinda la fakto, ke la nigron de la stratosfero la homoj de la 20-a jarcento ekvidis dum la unuaj flugoj en la kosmon. Je la plua etapo akompanis Fauston la nedisigebla Mefisto. La priskribo de tiu ĉi vojaĝo abundas je tre precizaj detalaĵoj. La flugo, kiu

okazis en alteco de 47 mejloj (86 km), daŭris 8 tagojn. Ankaŭ surprizas la vereco de la observado, kiun doktoro Faust povis el tiu alteco realigadi. "Rigardu, diris al li tiam Mefisto," maldekstre situas Hungario, plue Prusujo, Pollando, Danlando kaj tie oblikve Germanujo kaj Italio. Morgaŭ ni vidos Afrikon, Azion, Persion, Hindujojn....

La rakontadon pri "kosma vojaĝado" priskribis Faust en letero al sia amiko, kiu estis en Lipsko kuracisto, al Friedrich Victor. Sed kiamaniere la leteron kompreni? Ĉu ni perceptu liajn vortojn kiel sukcesan literaturan fantaziaĉon, aŭ kiel priskribon de realaj eventoj (kvankam je unua vido nekredablaj?) Aŭ kiel genian perceptaĉon de homo, kiu antaŭiris sian tempon? Finfine eĉ la granda Johann Wolfgang Goethe, kiu mem konis ne unu sekreton kaj estis granda favoranto de la spiritismo, estis fascinita per la persono de doktoro Faust. Tial li lin eternigis en sia ampleksa literatura verkaĉo filozofia. Kial tiom granda mago fariĝis literatura figuro kaj ne kiel la personaĉo historia, ververe ekzistanta?

Tradukis Jana Cíhová

Vinilkosmo-Komuniko

Baldaŭ ĝi venos - la longe atendita akustika albumo de *Persono!*

La fama esperanta rokbanda havas de kelkaj jaroj ankaŭ alian vizaĝon: tute akustikan, kun du gitaroj, kontrabaso kaj bele interplektiĝanta harmonia kantado. Multaj kiuj ĝuis iliajn etosplenajn koncertojn (i.a. en UK en Montpeliero, KAFE en Tuluzo kaj pluraj KEF en Svedio, Danio kaj Finnlando) senpacience atendis diskon kun tiu repertuaro de la bando.

Nun ĝi venas, transprenanta la etoson kaj intimecon de la koncertoj al via KD-ludilo! La disko enhavas naŭ novregistritajn kantaĉojn kiel ekzemple la jam klasika "Mi ĉiam kredis", la mistika "Perloj sur la tero" kaj la svenige bela akustika transformaĉo de la iama elektra furoraĉo "Revoj". Aldone al la novregistritaj pecoj la KD finiĝas per du jam eldonitaj kantaĉoj kun plibonigita sono.

La preparoj estas en la lasta fazo kaj vi jam prepariĝu por ĝia alveno.!

Ekde nun vi povas rezervi vian ekzempleron kiun vi ricevos tuj post apero kontraŭ pago de 13 EUR kun imposto (AVI) + 3, 31 EUR (sendokostoj nur por Eŭropaj Uniaj landoj) por mendo en aliaj landoj ekster Eŭropa Unio, pliaj kvantoj aŭ libroservoj kontaktu nin ĉe :

VINILKOSMO "Esperanto-Muzik-Prod." FR-31450 Donneville Francio

Tel : +33 (0)5 61 81 95 65 Faks : +33 (0)5 34 66 04 15

Reto : "Vinilkosmo" eurokka@club-internet.fr

Kompreneble, ankaŭ la disko disponeblas en nia TTTejo :

www.vinilkosmo.com

Alia bona novaĉo.

Ankaŭ paralele prepariĝas kaj bone evoluas la granda projekto "Elektronika kompilo", kiu prezentos aktualan elektronikan muzikon en esperanto fare de kelkaj konataj sed ankaŭ pluraj tute novaj artistoj kaj DJ-oj el plej diversaj landoj. La fina rezulto alportos sufiĉe gravan kaj surprizan verkaron al esperanto-muzikkulturo. Estu atenta. ne maltrafu la eventon kaj la okazon aktualigi vian espomuzikan kolekton !

NI PROVU RIDETI !

Dum faka ekzamen-sekvenco en kliniko, iu kuracisto admonas kandidatinon:

"Vere, Fraŭlino, vi tre mallerte pikvundas tiun malsanulon... Bonvolu refari, ĝis kiam mi plenplene aprobos..."

Policisto ekvidante iun viron en rivero aladmonas:

« Malpermesate bani ĉi tie » ! Jen kio kuŝas sut tiu bone videbla panelo... ĉu vi ne scipovas legi ?

La banisto, kiu svingiĝas kiel furiozulo, sukcesas ekkrii:

"Sed mi ne banas! Mi dronas!... - Nu, bone, replikas la policisto... Tiuokaze rapidu, se ne, mi estos devigata monpuni vin !..."

✱

Du iom diboĉemaj amikoj denove trafas sin en la komuna laborĉambro iun matenon:

"Nu, karulo. ĉu bone disvolviĝis cia rehejmiĝo je la kvara matene? - Senprobleme! Mi eniris la ĉambron silente... kaj kvarpiede! Tiam, mia duondormanta edzino demandis... Ĉu ci? Black?... - Kion ci respondis? - Nenion, mi simple lekis ŝian manon!"

✱

Tiu eta entrepreno spertas financajn problemojn. La direktoro vokas la responsulon de la labor-skipo:

"Mi bedaŭras anonci al vi malbonan novajon. Por plufunkcii, mi devos maldungi dek laboristojn... - Sed, sinjoro direktoro, ni estas nur ses! - Nenia problemo, rapidu dungi kvar pluajn homojn!"



"Ha lol!... vokas klarvidantino, ĉu mi trafte telefonas al okulkuracisto?... Rendevuon mi petas. Mi certgrade maljuniĝas kaj sekve iĝas iom post iom okulfebla. Mi senprobleme vidas ĉiujn eventojn de la jaro 2010, sed mi tute ne kapablas riveli al miaj klientoj kion okazos al ili post unu semajno!"

✱

Ĉe psikatro paciento amare tradukas sian malesperon:

„Min forlasis la edzino, ankaŭ mia amikino forflugis; plue grandan sumon mi perdis ludante en kazino kaj mia direktoro ĵus anoncis al mi, ke mi estas maldungita.... Sola solvo por mi estas memmortigo!

- Nu, ne tiom stulte kondu! Hieraŭ mi ĉeestis cirko-spektaklon kun miaj infanoj kun kompreneble neforgesinda sekvenco de la fama klaŭno Jozefo... Iru kaj vidu mem! La homo estas eksterordinare petola kaj multfacete gagriĉa! Kredu min, poste vi retrovos emon al pluvivo!
- Pri tio mi vere dubas.... mi estas Jozefo!"

✱



Alvenis la naskiĝdatreveno de la ĉi-supra entreprenestro, kaj la edzino decidis donaci al li iun novan violonon pro kadukiĝo de la antaŭa.

La edzo delikate malfermas la pakajon kaj tuj post la apero de la muzikilo la edzino ekkrias kun fiera tono:

"Karulo, temas pri aŭtentika Stradivarius! Tion certigis al mi la vendisto! - Ci fakte troiĝas, replikas la edzo iom seniluziigita, sur la etikedo interne mi legas "ellaborita en Tajvano"!... - Kompreneble! La vendisto klarigis al mi, ke Stradivarius kutimas feritempi tie!..."

✱

Iu estro de entrepreno anoncas al sia edzino dum la tagmanĝo, ke li ricevis viziton de sindikataj delegitoj.

"Imagu, la postulo de la grupo rilatis al malaltigo de salajro!"

- Nu? Vera neatenditaĵo ĉu ne? Ĉefe nuntempe, kiam en ĉiuj entreprenoj oni frontas la malon! Supozeble ci ja kontentas pri la afero!.. - Kontentas mi? Ĉu ci frenezas?!... Temis pri malaltigo de mia propra salajro!"

✱

En operejo kantistoj diligente trejnas ĉar malfacila estas la studata verkaĵo. Riproĉante grumblas la enscenejstoj kaj admonas la tenoron:

"Iom pli pasie, Sinjoro... iom pli pasie! Ĉu vere vi neniam pasie amis? - Jes ja... sed mi ne kantis samtempe!"

"Koncerne min, eldiras jumolino, mi edzinigos altstaturan, belan, riĉan, inteligentan viron..."

- Jes ja, karulineto, aprobas la patrino, je via aĝo mi tutsame fantasmis... Finfine mi edzinigos vian patron!..."

✱

→ → → (Gepruduloj... nekonsilinda legado!)

Iu ventroparolanto kaj iu graveda virino vojaĝis kune trajne en la sama kupeo. Ŝi kviete legantas gazeton, kiam subite aŭdiĝas bebo-voĉon:

"Manjo!" La virino ĉirkaŭokulumas, nenion vidas.... *"Manjo!"*

"Ĉu vi aŭdis? demandis la virino..

- Jes, ŝajnas ke jes, respondas la viro, "Manjo!..."

- Sed, ĉu vi, ĉu vi bebo mia?

- Jes, mi estas, kara Manjo!..."

- Sinjoro, jen eksterordinara evento, mia bebo en mia ventro alparolas min!

- Mirinde, jes.... Tion mi neniam vidis, aldonas la viro...

"Etulo mia, ĉu ci bone fartas?"

- Jes, Manjo, tre bone!..."

- Kaj ĉu ci deziras ion?

- Jes, Manjo, mi deziras premi la manon de la sinjoro..."



Tiu fiŝkaptisto atingas rivermarbordon kaj malkovras sur arbo-trunko tiun averto-tabuleton en dikaj karakteroj:

« Malpermesate fiŝkapti ĉi tie » Sube, ne tiom okultrafe, aldoniĝas eta teksto: *" Post prezento de via fiŝlegitimilo, vi profitos 10% da rabato je aĉeto de trutoj, karpoj, angiloj tre bonkvalitaj ĉe nia fiŝvendejo, placo de la stacidomo "*

✱

